1987 oktobro
80a jaro
n-ro 982 (10)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)
sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando

Labora kaj festa

TEJO-kongreso

FOKUSO ĈE AZIO

Vi trovos,

ke pli okazis ĉi-somere ol la Universala Kongreso. De Bulonjo ĝis Graz, de Oslo ĝis Zagrebo la eŭropaj esperantistoj festis la Jubileon. Raportoj tiutemaj svarmas tra niaj paĝoj — kaj postlasas, almenaŭ niaflanke, iom tro dolĉan guston de memkontento. Eble ankaŭ nia septembra numero tiele pekis. Por progresi, ĉu ni ne bezonas pli kritikan aliron al niaj propraj aranĝoj, postĉase al lingvo kaj kulturo ne etrondaj sed vere universalaj?

Ja ekzistas signoj de progreso. Iuj troveblas en la unuaj tri paĝoj ĉi-numere, dediĉitaj al la Movado en la plej vasta kaj multpopola kontinento. Aliaj speguliĝas en la kreskanta membronombro de UEA... Komence de oktobro pli ol 42 500 homoj apartenis al nia Asocio, inter kiuj 7115 individuaj membroj. Ĉu ni atingos 7500 ĉi-jare? Nur pere de via varbado: utiligu profite la lastajn Jubileajn monatojn!

Enhavo

169 Azia konferenco de UEA en Tokio: Grandega donaco por sproni la agadon en Azio (S. Milojević)
170 Korea movado: Letero el Azio (Spomenka Štimec)
171 Ĉina movado: "Faktoj pli elokventas ol argumentoj" (Zhang Qicheng); Jubilea ekspozicio en Pekino (Qin Kaiji)
172 Honoraj membroj: Kvin novaj panteonanoj
173 Infana kongreseto: Skandala neglekto (Christopher Fettes)
174 Kunveno de la legantoj de la revuo *Esperanto* (Mark Fettes)
Kongresoj: Zamenhofa SAT-kongreso (Bert de Wit); Eventoplena semajno en Graz; ICNEM malfondita (Pascal Dubourg-Glatigny); Afrikaj esperantistoj venis spertiĝi en Hungario (Péter Sándor); Duobla jubileo en Finnlando (Jukka Laaksonen); Kulmina norvega kongreso (Elna Matland)
177 Instruistoj: Pliaj pruvoj de revigliĝo
178 "Cent jaroj de Esperanto-kulturo" en Zagreb: Mirige varia programo (Gerrit Berveling); Kvieta sed interesa simpozio (Nikola Rašić)
180 Junularo: Rekorda IJK — precipe distr-okazo? (Kerstin Schulze, Edlyn Teske kaj Thomas Pusch); TEJO-aferoj; Recenzo pri kvar renkontiĝoj (Georgo Kamaĉo)
182 Kalendaro (informoj pri eventoj ĝis la fino de la Jubilea Jaro)
183 Reagoj: Paŝeto al vera neŭtraleco (Prentiss Riddle); Pri la Jubilea Numero (Edmond Ludwig, L.H. Knoedt, Gerrit Berveling, Gustav Stenholm); Neŭtraleco aŭ justeco? (J.A. Cox); Pliefikigi niajn kongresajn kunvenojn (Ivo Durwael); Por lingvo taŭga por ĉiuj (Hélene Falk, Ilio Calabresi)
184 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
185 Oficiala Informilo; Loke—Fake—Persone (mallongaj novaĵoj)
187 Kotiztabelo por 1988
188 Anoncetoj; Nekrologoj

La kovrilo

Pristudi, diskuti, agi — aŭ kanti, babili, distriĝi? Lingvo estas multflanka fenomeno, kiel ilustras perfekte la kongresoj de la esperantistoj — ĉi tie IJK en Krakovo, tra la lenso de Andrzej Sochacki. Ĉu niaj someraj aranĝoj atingis ĝustan evilibron inter festo kaj laboro?

La Centra Oficejo estas en embaraso...

La individua membraro de UEA tiel ŝtorme kreskas, ke eĉ ni mem ne kuraĝis tion antaŭvidi! La unuaj kvar ĉi-jaraj numeroj de tiu ĉi revuo elĉerpiĝis. Ĉu eble vi ne plu bezonas la proprajn ekzemplerojn? Ĉu vi bonvolus redonaci ilin al ni? Dankon!

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata en** 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.
Redaktoro: Mark Fettes.
Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US$ 21; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.
Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Adreso de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.
Telekso: 23721 uea nl.
Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.
Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). **Nederlanda poŝta ĝirkonto:** 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, Jubileo): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744; telekso (5) 9103500242 ud.
Vicprezidanto (Gvidas eksteran agadon): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35
Vicprezidanto (interna kaj ekstera agadoj): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tôkyô, 153, Jap.; tel. (3) 770 64 86; telekso 02655177 eki j.
Ĝenerala sekretario (interna agado): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.
Estrarano (ekstera agado): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Fr.; tel. (1) 46 65 22 16.
Estrarano (financoj): s-ro Gian Carlo Fighiera, Juan Ramón Jiménez 28, 6°A, E-28036 Madrid, Hispanio; tel. 250 39 87; telekso 42188 omt e.
Estrarano (ekstera agado): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hung.; tel. (1) 316 423; telekso 225931 muegy h.
Estrarano (interna agado): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cecina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.
Estrarano (gvidas internan agadon): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Maandelijks tijdschrift "Esperanto", nr 982 (10), oktober 1987. Verantwoordelijke uitgever: G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge.

Grandega donaco por sproni la agadon en Azio

Tra la pasintaj monatoj dufoje estis aludita en ĉi tiu revuo granda donaco, kiun UEA ricevis por plivigligi la laboron por Esperanto en Azio. Temas fakte ne nur pri granda sed pri grandega donaco de 30 milionoj da japanaj enoj, kio en la fino de septembro egalas al 425 000 guldenoj. Se tio ne estas la plej granda unufoja donaco, kiun UEA ricevis en sia longa historio, ĝi certe estas unu el la plej grandaj. La donacinto, dumviva membro de UEA, samtempe donacis al Japana Esperanto-Instituto la sumon de 20 milionoj da enoj. En sia klariga letero li emfazas la "modestecon" de la donaco kaj diras, ke lia profesia vivo malhelpis lin mem aktivi por Esperanto, kaj li nun faras la donacon por ke aliaj povu aktivi.

Ricevinte la grandaniman donacon, la Estraro de UEA petis sian vicprezidanton, s-ron Umeda, sondi la eblecojn kiel plej bone utiligi la novan financan bazon de la agado por la Internacia Lingvo en Azio. El tio fontis la iniciato okazigi la 28an kaj 29an de aŭgusto en Tokio la Unuan Azian Konferencon de UEA.

La Konferencon organizis kaj prezidis s-ro Yosimi Umeda, kiu tra la pasinta duonjara estis en vigla koresponda kontakto kun preskaŭ ĉiuj landaj E-organizaĵoj en Azio. Ĉeestis reprezentantoj de Ĉinio, Honkongo, Japanio kaj Koreio, sed ankaŭ gastoj el Aŭstralio kaj FR Germanio kaj delegitoj de pluraj regionaj kaj lokaj E-organizaĵoj el Japanio. Estis tie ankaŭ senditoj de Rondo Fremdlandaj Studoj funkcias tuta fabriko de Esperanto-instruistoj, tiel ke ĉiujare dudeko da fremdlingvaj instruistoj el la universitatoj kaj altlernejoj de la tuta lando dum du semestroj intense studas la Internacian Lingvon, por poste reiri al siaj lokoj kaj pluinstrui ĝin. Ŝanhajo nur en kelkaj jaroj sukcesis atingi sur ĉi tiu kampo similajn rezultojn por kiuj la Esperanto-fako ĉe la Scienca Universitato en Budapeŝto bezonis du jardekojn. Ni ne volas ĉi tie malgravigi la pioniran rolon, kiun sur ĉi tiu kampo ludis la ĵus forpasinta prof. Szerdahelyi en Budapeŝto, sed la intenseco de la apogo, kiun Esperanto nun spertas en Ĉinio, estas io nova, io ne spertita ĝis nun.

En Seulo, la ĉefurbo de Korea Respubliko, en la kadro de Universitato Dankook nun ekzistas Esperanto-Instituto, kun dungitaj esperantologoj kaj planoj, kiuj nutras sin el la spertoj de Budapeŝto kaj Ŝanhajo. Ĝenerale parolante, ŝajnas ke ni ankoraŭ ne konscias pri la granda populariĝo, kiun la Internacia Lingvo spertas en Koreujo dum kelkaj lastaj jaroj, pri la amaseco sed ankaŭ kvalito de la Movado en tiu lando.

La Konferenco sukcesis interese revui la nunan staton de la Esperanto-movado en la reprezentitaj landoj sed nur aludi la problemojn de la Esperanta agado en aliaj landoj de la azia kontinenta vasto. Multaj ideoj svarmis en la konferencaj elpaŝoj, kaj s-ro Umeda provis resumi ilin fine de la dutaga aranĝo. La ĉefa inter tiuj ideoj estas la





Harmonia (tutlanda studenta E-organizaĵo en Japanio) kaj Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto. Temis entute pri 26 konferencanoj el 6 landoj.

Dum la unua konferenca tago oni aŭdis raportojn pri la lastatempa agado por Esperanto en Aŭstralio, Ĉinio kaj Korea Respubliko, dum la reprezentantoj de regionaj organizaĵoj el Japanio kaj Ĉinio (Ŝanhaja Esperanto-Asocio) raportis en la dua konferenco tago. Eĉ por informita observanto (kio pretendas esti la subskribinto de ĉi tiu teksto) tiuj raportoj enhavis kelkajn gravajn novaĵojn pri la Esperanto-Movado en Azio. Jen du ekzemploj:

Jam de kelkaj jaroj ĉe la Ŝanhaja Universitato de kreo de Azia Centro de UEA, ĉar la donacita kapitalo sufiĉas por financi konvenan konstruaĵon ekzemple en Ĉinio (dum ĝi facile konsumiĝus per aĉeto de kelkaj kvadrataj metroj da oficeja spaco en Tokio aŭ en Honkongo). S-ro Umeda jam delonge traktas kun Ĉina Esperanto-Ligo la eblecojn, kiuj prezentiĝas en tiu lando. Tamen, restas ankoraŭ sufiĉe longa vojo irenda antaŭ ol definitive decidi, ĉu konstrui azian sidejon de UEA kaj kie fari tion. S-ro Umeda estos denove en Ĉinio fine de oktobro, pasiginte komence de oktobro kelkajn tagojn en Korea Respubliko. Krome, por faciligi la traktadon de la preparlaboroj survoje al kreo de Azia Centro de UEA, fine de la Unua Azia

Konferenco malfermiĝis en Tokio (ĉe la adreso de s-ro Umeda) provizora Tokia Oficejo de UEA. Intertempe, la granda donaco estas deponita en ŝparkonton kaj ĝi generas interezon, sufiĉan por kovri la nun okazantajn preparlaborojn por baldaŭa intensa agado en Azio.

Necesas noti ĉi tie, ke la rapideco kaj maniero en kiu la Konferenco estis kunvokita provokis iom da streĉiteco kun Japana Esperanto-Instituto, kiu prave atendas pli esencan rolon en ĉiuj paŝoj de UEA en tiu parto de la mondo. Tiuj problemetoj tamen survojas al solvo. Ni dirus, ke la Konferenco montriĝis utila kaj ke ĝi estis ĝusta paŝo por ankoraŭ en la Jubilea Jaro dece marki unu el la plej belaj kaj plej promesplenaj donacoj, kiujn la Internacia Lingvo ricevis por sia centa datreveno.

S. Milojević

KOREA MOVADO

Letero el Azio

Korea Esperanto-Movado ne aperas ofte sur la paĝoj de *Esperanto*. "La lando de kvieta mateno", kiel koreoj nomas Korean Respublikon, malprave forestas el Esperanto-gazetoj. Al tio ankaŭ kontribuas la fakto, ke modesto de koreoj ne permasas fanfaronadon. Tial la silento kapablas transformiĝi en neinformadon. Legantoj de *La Espero el Koreujo,* kiun malavare subvencias s-ro Han Moo-hyup kaj kun multa kompreno por specifaĵoj de la korea kulturo redaktas d-ro Ĵeong Seong-choong, povas ricevi pli vastajn informojn ne nur pri Esperanto-aktualaĵoj el tiu ĉi mondoparto.

Okaze de la Jubilea Jaro mi dum kvar semajnoj partoprenis en la Esperantaj aktivecoj de la ĉefurbo Seulo. La dekmilionhoma ĉefurbo de Korea Respubliko okupas laŭ iuj statistikoj la okan lokon en la mondo laŭ la loĝantarkvanto. Esperanto aperis ĉi tie en la jaro 1906 kaj aktuale Korea Esperanto-Asocio nombras 900 membrojn. La Asocio posedas propran oficejon kun kvar plentagaj oficistoj. Pri ilia laboro informu interalie la fakto, ke ili monate vendas Esperanto-librojn je ĉ. 2500 guldenoj. Koreaj esperantistoj cetere posedas tre detalajn vortarojn, kies kompilinto s-ro Hajpin Li, post tiu ĉi vivoverko, plue aktivas. Okaze de la Jubilea Jaro li preparis la kolekton: *Koreaj noveloj, eseoj kaj popolrakontoj.*

Eksterlandaj esperantistoj estas agrable surprizitaj nur nur per agado de meritplenaj koreoj, sed ankaŭ per la kvanto de junaj vizaĝoj inter koreaj geesperantistoj. Kvankam la korea lingvo tre malproksimas de fonetikaj kaj vorttrezoraj kutimoj de Esperanto, koreoj investas grandan kvanton da energio por atingi parolkapablon en Esperanto. Pro relativa geografia izoliteco de la lando, ne abundas kontaktoj kun alilandaj esperantistoj. En la lastaj jaroj populariĝis komunaj "kunloĝadoj" kun najbaroj — japanoj.

Apartan antaŭenpuŝon al Esperanto en Koreujo donis d-ro Chang Chung-sik, kiu tranprenis prezidantecon de la Asocio en la jaro 1982. D-ro Chang apartenas al tiuj erudiciuloj, kiuj ĝuas altan prestiĝon en la korea socio. Li estas unu el tri vicprezidantoj de Korea Olimpika Komitato, en kies kadro li respondecas pri eksterlandaj aferoj.

2-a Internacia Akademia Konferenco Pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto 10-16 aŭgusto, 1988, Pekino, Ĉinio

Funkciiganto: Ĉina Akademio de Sciencoj
Organizanto: Sciencist-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, 52 Sanlihe, Beijing, Ĉinio.
La temo: La reciproka efiko inter scienco-tekniko kaj socio

La konferencaj temoj:

1. La influo de la nova teknika revolucio sur modernajn ekonomikon kaj socion;
2. Kiel la novaj teknikoj ŝanĝas nian ĉiutagan vivon;
3. La socia utilo de rezultoj de sciencaj esploroj;
4. Nuntempaj medicinaj teknikoj — novaj metodoj de sanoprizorgado, kuracado kaj preventado de malsanoj;
5. Nova teknika revolucio kaj plua edukado.

Oficiala laborlingvo: Esperanto

Pli detalajn informojn ni sendos al la petantoj. Skribu al: S-ino Wang Yuchun, Ĝenerala Sekretario, Esperanto-Asocio, Academia Sinica, 52 Sanlihe, Beijing, Ĉinio.

Ĉar en 1988 Seulo gastigos la 24ajn Olimpiajn Ludojn, d-ro Chang havas multajn eblecojn informi pri Esperanto diversajn altrangulojn, kiuj kutime indiferentas pri Esperanto. Ke li tion faras kun pripenso kaj inteligento, mi mem abunde spertis, informante pri Esperanto, per lia helpo, interalie plurajn prestiĝajn funkciulojn de la sporta mondo en Koreujo kaj ankaŭ membrojn de Rotariklubo en Hansong.

En la Universitato Dankook, kiun prezidas d-ro Chang, li en 1986 establis Esperanto-Instituton, kun aganta direktoro s-ro Ma Young-tae. En tiu ĉi universitato estas Esperanto instruata ekde 1985, kiel unu inter diversaj duaj fremdaj lingvoj. (La universitato mem nombras 20 000 studentojn, el kiu eble 600 en la lastaj jaroj vizitis Esperanto-kursojn.) La instituto ne nur prizorgas Esperanto-instruadon sed ankaŭ klopodas pri ĉiuj aliaj aktivecoj ligitaj al Esperanto en Koreujo. Interalie ĝi preparas periodaĵon *La Mondo de Universitato,* kiu ekde aŭtuno 1987 aperos en Esperanto kaj la korea, kaj planas estonte interŝanĝi ne nur esperantaĵojn sed ankaŭ Esperanto-fakulojn cele al pliriĉigo de universitatnivelaj informoj en Koreujo. Laŭ ĝia invito, mi gvidis du kursojn dum aprilaj kaj majaj tagoj ĉe Korea Esperanto-Asocio.

Interŝanĝo de spertoj en kaj per Esperanto inter movadoj, kies landoj apenaŭ kunlaboras alikampe, ĉu tio ne estas salutinda paŝo en la Jubilea Jaro? En Korea Respubliko Esperanto intelekte kaj materie ne malbone fartas. Ni rajtas supozi, ke en la dua jarcento Esperanto estos pli vastskale nutrata per intelektaj kontribuaĵoj de siaj parolantoj ekster la eŭropa kontinento.

Spomenka Štimec (Jugoslavio)

"Faktoj pli elokventas ol argumentoj"

Jen ĉina proverbo kiu verŝajne ankaŭ validas por la Esperanto-movado. Kiam oni retrospektive rigardas la evoluon de nia ĉina movado, oni povas konstati, ke sufiĉe multe da elstaraj personoj en nia lando, precipe tiuj en la kulturaj rondoj, bone konas la signifon de nia lingvo kaj ĝin subtenas guste pro tio, ke ĉinaj esperantistoj faris tre efikajn per-Esperantajn laborojn kaj montris al la publiko per konvinkaj faktoj la praktikan utilecon de la lingvo.

Dum la 20-aj jaroj de la nuna jarcento, kiam la gvidantoj de la kampanjo por krei novan literaturon en Ĉinio iniciatis enkonduki literaturaĵojn de la tiel nomataj "malgrandaj kaj malfortaj nacioj", la noveloj de la bulgara Vazov kaj pola Ŝienkevic, la poemoj de la hungara Petöfi kaj ankaŭ la rakontoj de hebreaj verkistoj estis tradukitaj en la ĉinan lingvon el Esperanto. Tiam, ege malmultaj ĉinoj scipovis la bulgaran, polan, hungaran kaj hebrean lingvojn, preskaŭ neniu kapablis traduki ion rekte el tiuj lingvoj. Feliĉe, troviĝis Esperantaj tradukoj de tiuj verkoj dank' al penado de niaj movadaj pioniroj, kaj pere de Esperanto oni sukcesis konatigi la valorajn verkojn de la malgrandaj nacioj al ĉinaj legantoj. Kaj tion farante oni ankaŭ konatigis la valoron de Esperanto al la ĉina publiko, precipe al la intelektuloj kaj junuloj.

Poste, dum la 30-aj jaroj, oni eldonis en Ŝanhajo Esperantan informan bultenon nomitan "Ĉinio Hurlas". Multaj informoj kaj artikoloj pri la suferoj kaj bataloj de la ĉina popolo el tiu bulteno estis utiligitaj de diverslanda gazetaro. Aliflanke, multspecaj kaj interesaj materialoj el Esperantaj periodaĵoj estis aperigitaj tiutempe en ĉinaj ĵurnaloj aŭ revuoj dank' al la energia laboro de ĉinaj esperantistoj.

Dum la periodo de rezist-milito, la Esperantaj revuoj "Heroldo de Ĉinio", "Voĉoj el "Oriento" kaj "Orienta Kuriero" estis eldonataj respektive en Chongqing, Hankou kaj Hongkong kiel informiloj pri rezistbataloj de la ĉina popolo. La aktuala informado de tiuj revuoj akiris por la suferanta kaj batalanta Ĉinio simpation kaj subtenon de la internacia komunumo, precipe de la esperantistaro.

La supre menciitaj faktoj plene montras, ke en la ĉina Esperanto-movado estis bona tradicio — tradicio de efika per-Esperanta laboro, aŭ pli emfaze, tradicio de utiligo de Esperanto por praktikaj celoj. Kompreneble, tio tute ne signifas, ke ĉinaj esperantistoj ne faris abundajn kaj fruktodonajn por-Esperantajn laborojn.

Post la fondiĝo de nia popola respubliko, ni sekvis tiun ĉi tradicion. Antaŭ ol fondi novan landan asocion, ni unue lanĉis la eldonadon de "El Popola Ĉinio". Kaj post pluraj jaroj ni sukcesis funkciigi Radio-Pekinon en Esperanto.

Kiel persona spertanto de tiu tradicio, mi ofte emas emfazi la signifon de per-Esperanta laboro, aŭ la gravecon de aplikado de Esperanto en diversaj kampoj de la homa vivo: ĉar mi kredas, ke ju pli multflanka estos la aplikado de Esperanto en praktiko, des pli multaj homoj ekkonos ĝian valoron, kaj sekve des pli grandskale disvastiĝos la lingvo kiel internacia komunikilo.

Mi do sincere esperas, ke en la dua jarcento de nia lingvo, ĝia praktika aplikado grandpaŝe disvolviĝos kaj paralele kun tio ĝi paŝon post paŝo atingos la brilan celon de vere universala disvastiĝo.

Zhang Qicheng (Ĉinio)

Jubilea ekspozicio en Pekino

Inter la 26a de julio kaj la 1-a de aŭgusto, do precize samtempe kun la UK en Varsovio, grupo de Esperanto-organizaĵoj en la ĉina ĉefurbo okazigis grandan ekspozicion en la Kultura Palaco de Pekinaj Laboruloj. La inaŭguran ceremonion ĉeestis pli ol 500 homoj, inkluzive de Xiao Ke — fama generalo kaj apoganto de Esperanto; lingvisto kaj vicprezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo Chen Yuan; tradukisto Ge Baoquan, prezidanto de Pekina Esperanto-Asocio; kaj aliaj gravaj kaj veteranaj membroj de la ĉina movado.

La inaŭguro koincidis kun la unua tago de la ĉina Jubilea poŝtmarko, kiun oni eksponis kune kun aliaj Esperanttaj filatelaĵoj en la oka sekcio de la ekspozicio. En aliaj sekcioj traktiĝis la historio de Esperanto en Ĉinio, revua kaj libra eldonado, la elsendoj de Radio Pekino kaj la agado en la kampo de scienco kaj tekniko (en kiu Ĉinio, kune kun Hungario, fakte gvidas la Movadon).

Kelkaj miloj da homoj vizitis la ekspozicion, kaj krome la pekina kaj ĉinia televidostacioj plurfoje dissendis filmon pri ĝi tra la tuta lando.

Qin Kaiji (Ĉinio)

En la foto: *Ge Baoquan parolas en la inaŭguro.*

La "jubilea kolekto" de Honoraj Membroj donas konvenan emfazon al Pollando, apreze salutas la vastiĝantan movadon en Koreio, kaj substrekas la valorojn de Esperanto kiel perilo de internacia scienco kaj kulturo. De m.d.: Boza Popović, William Auld, Ludoviko Zaleski-Zamenhof, Ĝang Ĉung-Sik, Józef Toczyski.

HONORAJ MEMBROJ:

Kvin novaj panteonanoj

Laŭ propono de la Estraro, la Komitato en Varsovio elektis unu novan membron de la Honora Patrona Komitato de UEA kaj kvar novajn Honorajn Membrojn. Jene sekvas la biografietoj de tiuj elstaraj esperantistoj.

Ĝang Ĉung-Sik (1932), koreo, aliĝis al la dekduo de Honoraj Patronoj, aktivaj esperantistoj kiuj atingis esceptan eminenton en sia profesio. D-ro Ĝang diplomiĝis pri historio ĉe Seul-Nacia Universitato kaj plustudis ĉe Universitato Brigham Young (Usono); li ricevis honorajn doktorajn diplomojn de usona kaj franca universitatoj. Post faka kariero, inkluzive la verkadon de kelkaj libroj, li fariĝis prezidanto de Universitato Dankook en 1967, nur 35-jara, kaj ankoraŭ hodiaŭ okupas tiun postenon; krome li estas vicprezidanto de Korea Olimpika Komitato kaj prezidanto de Universitata Sport-Komitato kaj de la Korea Eduka Konferenco. Pro siaj eduka kaj humanisma agadoj li ricevis kelkajn premiojn, i.a. la Azian Pacpremion pri Eduka Fako en 1985. Inter la pluraj meritoj de d-ro Ĝang en la korea Esperanto-movado (li estas prezidanto de Korea Esperanto-Asocio de post 1982), elstaras lia pasintjara iniciato fondi Esperanto-Instituton kadre de sia universitato, kie Esperanto jam rolas kiel unu el la duaj fremdlingvoj.

William Auld (1924), skoto, vicestro de liceo, eklernis Esperanton en 1937 sed aktiviĝis nur dek jarojn poste. Unu el la plej konataj kaj fekundaj kontribuantoj al la Esperanta kulturo, aŭtoro aŭ redaktinto de kvardeko da libroj. Li elstaras kiel unu el la du plej grandaj Esperantaj poetoj (kun Kalocsay), aparte pro sia epopeo *La infana raso* (1956) sed ankaŭ per poemaroj: parto de *Kvaropo* (1952), *Unufingraj melodioj* (1960), *Humoroj* (1969), *El unu verda vivo* (1978). Kiel Kalocsay, li same imponas en tradukado: *Angla antologio,* poemaro de Robert Burns, la sonetoj de Ŝekspiro, *Aniaro* de Harry Martinson estas nur kelkaj gravaj. Li redaktis ambaŭ eldonojn de *Esperanta antologio* (1958 kaj 1984) kaj publikigis ses librojn de eseoj pri la Esperanta literaturo kaj kulturo. Inter pluraj revuoj kiujn li redaktis, ni menciu *Esperanto* (1955-58, 1961-62), *Fonto* kaj *La brita esperantisto* (ankoraŭ hodiaŭ). Auld servis kiel vicprezidanto de UEA (1977-80) kaj prezidanto de la Akademio de Esperanto (1979-1983).

Boza Popović (1913), jugoslavo, astronomo, eklernis Esperanton en 1931 sed komencis grandskale aktiviĝi post 1948. Lia lernolibro *Esperanto u 12 lekcija* atingis 5 eldonojn, dum ĝia ampleksigita posteulo *Esperanto u 40 lekcija* restas freŝdata kaj uzata. Prof. Popović estis komitatano de UEA de 1953 ĝis 1977, kaj ĝia vicprezidanto inter 1973 kaj 1974; en la jugoslavia movado li okupis diversajn postenojn, inkluzive tiun de la prezidanto. Sed pleje elstaras lia laboro en Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE). Inter 1961 kaj 1977 li plene identigis sin kun tiu grava faka organizaĵo, rolante kiel ĝenerala sekretario, prezidanto kaj aparte kiel redaktoro kaj eldonanto de *Scienca Revuo,* en periodo kiu fariĝis unu el la plej fruktodonaj por ISAE. Ankaŭ en sia eminenta scienca kariero li esceptagrade aplikis Esperanton: plena duono de liaj studoj aperis en la Internacia Lingvo, kaj la alia duono ricevis Esperantajn resumojn.

Józef Toczyski (1906), polo, instruisto pri kemio, esperantistiĝis jam en 1918 kaj restis aktiva movadano ĝis nun.Nur dudekjara li kunredaktis *Pola esperantisto,* kaj ĝis la dua mondmilito li gvidis la skoltan Esperanto-movadon en Pollando kaj alimaniere aktivis en la landa movado. Post la milito li rapide fariĝis unu el la ĉefaj polaj aktivuloj, gvidante la unuajn tri postmilitajn kongresojn kaj dum pluraj mandatoj rolante kiel vicprezidanto de Pola Esperanto-Asocio. De 1947 ĝis 1957 li gvidis la Esperanto-elsendojn de la Pola Radio en Gdansko. Li re-

Skandala neglekto

Se la Esperanto-Movado volas taŭge eniri sian duan jarcenton, ĝi devas konstati kaj pripensi la fakton ke 40% de la homaro estas malpli ol 15-jara; sed ŝajnas ke nek la UEA-Estraro nek la LKK en Varsovio konscias pri tio.

Post la Infana Kongreseto en Aŭgsburgo en 1985, mi nur milde riproĉis la tiaman neglekton, ĉar mi supozis ke nia Estraro, leginte tian kritikon en sia propra gazeto, certigus neripeton de la tieaj mankoj; pri tio mi naive eraris. Tial mi intencas ĉi-foje listigi la kondiĉojn bezonatajn por sukcesa IK, montri kiel fiaska estis tiu de Varsovio, kaj proponi agadon por eviti ripeton de tia skandalo.

Sekvas kondiĉoj por bona Infana Kongreseto, kaj ĉijara plenumo:

1. Loko ne tro for de UK-ejo, por ke gepatroj povu viziti la infanojn: **estis.**

2. Taŭga kongresejo, en trankvila loko kaj kun puraj kondiĉoj: **malestis.** Kaduka junulargastejo apud tramlinioj estis tutklare lastamomenta aranĝo.

3. Ĉambroj por ludi, labori, danci ktp: **malestis.** La domo havis nur unu kunvenejon, kaj tie 30 infanoj kun siaj gvidantoj povis sidi nur sardine.

4. Eblecoj ludi ekstere: **estis.** Sed mankis herbejo, kaj kompreneble nur kelkaj povis ekspluati la apudan tenisludejon. Vizito al banejo ne okazis.

5. Surlokaj manĝeblecoj: **ne estis.** 10-minuta promenado al najbara restoracio ne gravis, sed laŭtega muzikaĉo ne nur vespere sed eĉ matenmanĝe ofte malhelpis konversacion.

6. Kompetenta kongresestro: **malestis.** Ke LKK elektis por tiu tasko homon kiu (kvankam tre afabla) nur balbutis nian lingvon kaj malhavis organizkapablon estis eble la plej skandala aspekto de la tuta afero.



7. Internacia, taŭga kaj bone preparita gvidantaro: **ne estis.** El la kvin elektitaj gvidantoj, la flegistino tute ne parolis Esperante. (Ĉu la fremdaj infanoj ne rajtis estis malsanaj?) Unu nur malbone parolis; unu preskaŭ senĉese fumis; ĉiuj estis lastmomente invititaj. El la du fremdaj gvidantoj, unu estis dungita komence de julio, sed pro la lokaj kondiĉoj ne povis utiligi siajn konsiderindajn talentojn; la alia iom hazarde partoprenis, por ne forlasi samlandan infanon en tiaj malbonaj kondiĉoj.

8. Internacia helpantaro (t.e. junuloj 16- ĝis 18-jaraj, elektitaj por helpi la infanojn, ankaŭ lingve) **forestis.**

9. Adekvate internacia infanaro: **ne estis.** La geknaboj venis el malmultaj landoj: dum tiel granda UK, infanoj el 20 landoj devus esti minimuma celo. La duono estis pola; neniu venis eĉ el Hungario aŭ Bulgario; nur la ĉeesto de japaninaro donis serioze internacian guston.

10. Akcepto nur de taŭgaj infanoj: **malestis.** Kelkaj estis tro aĝaj (tamen almenaŭ helpemaj), triono ne atingis minimuman lingvokapablon, aliaj tro ofte krokodilis (ĉu por imiti iujn gvidantojn?).

11. Bone preparita programo: **ne estis.** Pri tio kulpis ne la programestro (kiu krome neniam antaŭe ĉeestis IK-n) sed la cirkonstancoj kaj la LKK, kiu neniel respondis al helpo trifoje proponita letere. Sed pri perdita dimanĉmateno kulpis supozeble la UEA-Estraro, kiu igis la infanojn atendi du horojn en la kulisoj (kiel en Lucerno, Budapeŝto, Aŭgsburgo...) antaŭ ilia du-minuta apero ĉe la

---

prezentis Internacian Ligon de Esperantistaj Instruistoj en Pollando dum pli ol tri jardekoj, plurajn jarojn komitatanis ĉe UEA kaj laboris kiel ĝia estrarano inter 1964 kaj 1969, plue servis kiel pola ĉefdelegito de 1971 ĝis 1987. Du pollingvaj libroj liaj pri Esperanto kaj lingvaj problemoj aperis en la Jubilea Jaro.

Ludoviko Zaleski-Zamenhof (1925), polo loĝanta en Francio, marinĝeniero, nepo de la iniciatinto de Esperanto. Li "lernis Esperanton hejme, ĉefe de Lidia" (sia onklino); 12-jara li salutis la 29an Universalan Kongreson de Esperanto en Varsovio, en la 50a jaro de Esperanto; en 1959 li kunlaboris en Loka Kongresa Komitato por la 44a UK en la Zamenhofa Jaro; kaj en 1987 li honoris la Jubilean 72an UK per sia entuziasma partopreno. El ĉiuj nepoj de Zamenhof li estas tiu, kiu plej profunde movadaniĝis. Tamen, kiel d-ro Zaleski-Zamenhof mem skuvorte klarigas: "La ĉefa parto de mia esperantista biografio estas tio, ke mi perdis mian tutan familion." Tiu korŝira tragedio kaj la neceso konstrui novan vivon en eksterlando verŝajne rolis en tio, ke en la lastaj jardekoj li elektis ne aktivi en la Movado. Feliĉe, laŭ li mem Varsovio pruviĝis tre pozitiva sperto (ambaŭflanke, cetere!), kaj oni esperas revidi lin pli ofte en la movadaj rondoj.



Inaŭguro. (Se iu ajn altrangulo estus ofendita ke infanaro estas momente prezentita antaŭ li, mi ja mirus.)

Kompreneble la infanoj, estante ruzaj homoj, sukcesis tiri ion pozitivan el tiu plenkreskula fuŝaĵo; estas tamen klare ke la kongresaj respondeculoj, per sia neglekto, trompis la esperojn kaj de la geknaboj kaj de tiuj geviroj kiuj vidas bonan IK-n kiel bonan propagandilon por Esperanto. (Malgraŭ ĉio, Pola TV filmis la Kongreseton — sed kia ŝanco perdita!) Êc ekde la elstare nekompetenta IK en Varna mi urĝis nian Estraron elekti iun kiu forprenus de la troŝarĝita KKS la priinfanajn taskojn. Multo ja estas kontrolenda: kongresejo, gvidantaro, programo, infanaro ktp; sed nur iu kiu jam spertis IK-ojn povus tion fari. Ĉu nia nova Estraro nun fine faros la minimumon por certigi ke neniam plu la infanaro estos neglektita tiel skandale?

Christopher Fettes (Irlando)

Pasporta Servo 1987-88

Aperis ĵus la aktuala listo de gastigantoj: 796 el 53 landoj. Ĝi aĉeteblas de la Libroservo de UEA kontraŭ 7,50 gld. Novaj gastigantoj estas daŭre serĉataj — anoncu vin antaŭ la 15a de decembro 1987 ĉe via landa respondeculo aŭ ĉe Bertil Wennergren, Ságargatan 18, S-116 36 Stockholm, Svedio (detaloj troveblas en la PS-libro).

Ineke Emmelkamp (Nederlando) iniciatis la organizon de ĉina sekcio en PS. Skribu por informoj, aŭ por proponi eventualajn interesatojn el inter viaj ĉinaj amikoj, al: Coranthijnestraat 69, NL-9715 RG Groningen.

KONGRESOJ

Zamenhofa SAT-kongreso

La 60a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazis en Bulonjo ĉe Maro de la 22a ĝis la 29a de aŭgusto. Partoprenis la kongreson proksimume 400 personoj el 20 landoj, kompare kun la ordinaraj SAT-kongresoj preskaŭ duobla nombro da kongresanoj. Pro la fakto ke la kongreso devis esti organizata en mallonga tempo post la nuligo de invito fare de PEA, kaj ĉar la kongresa komitato estis sufiĉe malgranda, ne estas mirige ke ne ĉio iris glate. Kampadantaj kongresanoj ekzemple ne povis tendumi sur la kongrestereno mem, malgraŭ antaŭa permeso, k.s...

La oficiala malfermo de la kongreso okazis en la sama teatro, kie en 1905 realiĝis la unua internacia Esperanto-kongreso. Kompreneble oni ne povis ne aŭdigi la paroladon, kiun Zamenhof tiam faris: ĉi-foje estis Gaston Waringhien kiu ĝin voĉlegis. Salutis la kongreson diversaj reprezentantoj de landaj laboristaj organizaĵoj, Grégoire Maertens nome de UEA, kaj telegrame la nepo de Zamenhof d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof. Posttagmeze la kongresanoj ĉeestis oficialan inaŭguron de busto de Zamenhof sur la urba Zamenhof-placo. Kiam vespere aldoniĝis soldramo de Jerzy Fornal, "Sopiro, laboro, espero", pri la ideoj de Zamenhof pri la intergentaj kvereloj kaj la paciga rolo de Esperanto, entute oni ne povis eviti rimarki ke Zamenhof foje estis en Bulonjo... Ne mirige ankaŭ ke por kelkaj SATanoj tiu kulto al la Majstro estis iom troa.

La laborkunsidoj dum kiuj oni traktis la jarraportojn estis prezidataj de junaj SAT-membroj, sed tio ne evitis

Kunveno de legantoj de la revuo *Esperanto*

Kvindeko da homoj ĉeestis la kunvenon en Varsovio dediĉitan al ĉi tiu revuo. Ĉar tio tamen prezentas malpli ol centonon de niaj abonantoj, ni resumos ĉi tie la ĉefajn komentojn kaj proponojn — atendante eventualajn reagojn.

Al plimulto de la intervenantoj plaĉis la ŝanĝoj en redakta tono kaj enhava emfazo dum la lasta jaro. Reliefiĝis aparte la deziroj por pluralismo de opinioj kaj "pli respondeca", kritika kaj detala traktado de gvidantaraj aferoj. "Ĉar la strukturo de UEA ne povas esti perfekte demokratia", iu opiniis, "la revuo devus per informado klopodi mildigi tion." Cetere pluraj emfazis la tutmondan rolon de Esperanto, en kiu oni devus doni apartan atenton al la kresko kaj vastiĝo de la movado en globa skalo.

Venis diversaj proponoj por plivastigo de iu flanko de la revuo: pli da recenzoj, pli da artikoloj pri la fakaj asocioj, pri ekstermovadaj temoj, pri movada sociologio ktp. Mi kiel redaktoro ne kontraŭus, eĉ bonvenigus principe iun ajn el tiuj proponoj — nur praktike ili ŝajnas aktuale maleblaj. Ne estus problemoj pri eltrovo de inda materialo por 32 paĝoj monate; sed la ekstraj kostoj por presado kaj precipe afranko ĉi-momente malpermesas tion.

En la varsovia kunveno ankaŭ anonciĝis la rezultoj de nia konkurso (*Esperanto* 1987/p.96) pri la nombro de esperantistoj en la mondo. Venis 56 respondoj el tre diversaj mondopartoj. (Iuj konkursantoj aldonis detalajn komentojn, por kiuj bedaŭrinde mankas spaco.) La respondoj al demando (a), t.e. la nombro de la esperantistoj laŭ propra takso, gamis de 40 000 ĝis 40 000 000; la meza cifero — ĉi-kaze la averaĝo de la 23a kaj 24a taksoj en laŭgranda sinsekvo — estis 2 000 000. Respondoj al demando (b), t.e. la takso, kiun oni atendis de esperantistoj ĝenerale, grupiĝis pli kohere inter 300 000 kaj 20 000 000, kaj la meza cifero estis 3 500 000. El tiuj rezultoj oni povas konkludi: (i) ekzistas granda diverseco de opinioj pri la demando; (ii) granda plimulto opinias, ke la efektiva nombro estas minimume dekoblo de la membraro de UEA, sed tamen malpli ol la takso de Unesko kaj aliaj fontoj (8 ĝis 12 milionoj); (iii) du el tri respondintoj kredas aliajn esperantistojn pli optimismaj/revemaj ol ili estas mem (ĉu ne ĉiama homa trajto?)... En nia ekstera propagando, eble estus bone limigi nin al taksoj ne pli ambiciaj ol la meza takso ĉi tie (2 milionoj) — kiu mem ŝajnas al mi iom optimisma; se oni ne povas eviti paroli pri ciferoj entute!

Lotumitaj gajnintoj de libropremioj estas J.E. Deligny (Francio), I. Ertl (Hungario) kaj Madrida Esperanta Liceo (Hispanio).

Mark Fettes

tro longajn diskutojn pri pasintaĵoj kaj fakte ne gravaj aferoj... Tamen okazis diskuto pri la estonteco kaj eĉ kelkaj pozitivaj rezultoj estis atingitaj. Oni starigis t.n. Amikecan Reton de personoj kiuj volas interŝanĝi servojn, ne kiel SAT-kopion de Pasporta Servo sed celante multe pli klerigon ol simple gastigadon. La iniciatanto de Amikeca Reto estas Gérard Rollin, 63 Avenue de la République, Charge, F-37530 Amboise.

La vera "politikumado" tamen ankoraŭ okazis dum ĉi tiu SAT-kongreso, nome kiam temis pri la Kongresa Deklaracio kaj interna gvidrezolucio. La Deklaracio atentas i.a. la malrespekton de rajto je inda hejmo en la Internacia Jaro de Senhejmuloj, kaj la akriĝantan disdividon inter laborhavantoj kaj senlaboruloj en pluraj landoj. Krome ĝi entenas paragrafojn, kiuj konsideras pozitive la evoluojn en Sovetunio kaj esprimas solidarecon kun Nikaragvo, kaj fine substrekas la neceson de nova sinteno rilate la naturon rigarde al la mondskalaj medioproblemoj.

La plej elstara parto de la kultura programo sendube estis la prezento de "Kandido" fare de André Morel. Tiu profesia franca aktoro sukcesis en perfekta Esperanto ĝisfine teni la atenton de la spektantoj. Vere malsukcesa estis la adiaŭa vespero — pro la fakto, ke ĝi estis tute en la franca kaj neniu faris iun penon iom traduki la aferon...

Laŭ publikeca vidpunkto, la kongreso havis bonajn eĥojn. La loka eldono de *Voix du Nord* kelkfoje skribis pri la kongreso kaj la regiona branĉo de la franca televido elsendis intervjuojn kun kelkaj eksterlandanoj. Cetere eĉ estis inter la kongresanoj en la unuaj tagoj nederlandaj jurnalisto kaj fotistino de la ĵurnalo *De Tijd,* kiu aperigis kelkpaĝan artikolon pri la varsovia kaj bulonja kongresoj en sia numero de la 18a de septembro.



Ĉu TEJO-kunsido? La kunveno de SAT-junularo enhavas konatajn vizaĝojn...

Venontjare SAT kongresos de la 6a ĝis la 13a de aŭgusto en Brazilo, en Campos do Jordao, la dua kongreso de SAT ekster Eŭropo. Mi esperas, ke la kongreso havos temon kaj ke la diskutoj pri la asocio tiam direktiĝos ĉefe al la estonteco — ĉar, kiel la ĉi-jara gvidrezolucio tekstas, necesas analizi la pozicion de la laborista Esperantomovado fronte al la evoluoj en la nuna socio.

Bert de Wit (Nederlando)

Eventoplena semajno en Graz; ICNEM malfondita

La Jubilea Esperanto-Konferenco (JEK), kiu disvolviĝis en la Stiria ĉefurbo la antaŭlastan semajnon de aŭgusto kun ĉirkaŭ 250 partoprenantoj el dudekkvino da landoj, celis plenumi ambician programon aparte allogan. Krom siaj agrabla lokigo, perfekta organiza komitato, altnivela enhavo, ĝi montriĝis por multaj surprize eventoplena kaj laborinstiga.

JEK komenciĝis per du oficialaĵoj: la inaŭguro de la konferenco mem kaj la solena inaŭguro de la jubilea Esperanto-monumento "La Espero". Okaze de la unua, post salutmesaĝoj de oficialuloj — inkluzive de Mark Fettes, la redaktoro de *Esperanto,* kiel reprezentanto de UEA — kaj de landaj delegitoj, prof. d-ro Ivo Lapenna festparole skizis la situacion de la Esperanto-movado ĝuste en ĉi tiu jubilea jaro. Li verve raportis pri la klopodoj iniciitaj jam antaŭ pluraj jaroj por iel komune festi la centjariĝon de Esperanto kune kun UEA kaj aliaj organizaĵoj, klopodoj kiuj kiel ĉiuj scias ne sukcesis. "Finfine io..." — tiel konkludante li dankis al SAT kaj UEA pro iliaj salutmesaĝoj, kaj reciprokis iliajn bondezirojn por sukcesa jubilea agado.

La postan tagon, sur la speciale rearanĝita Esperantoplaco en la urbocentro, oni inaŭguris la jubilean monumenton "La Espero", skulptaĵo de Jesper Neergaard, kiu laŭ la diversaj parolintoj "postlasas en Graz neforviŝeblan memoraĵon pri la centjariĝo de Esperanto". En sia dua parolado prof. Lapenna eksplikis sian penson rilate Esperanton en la hodiaŭa mondo, klarigante la motojn de la jubileaj presaĵoj de ICNEM: "Humaneca internaciismo. Por paco en libereco. Por libereco en paco." Ce tiu aranĝo la memordokumento, verko de la artisto Pierre Gaborit, estis transdonita al reprezentanto de la Internacia Esperanto-Muzeo Vieno (IEMW).

Dum la tuta semajno dekduo da lekcioj kerne kontribuis al la ĉeftemo de JEK "Cent jaroj de Esperantokulturo". Tiuj lekcioj estis pritraktataj de elstaraj kontribuintoj al la internacia kulturo kaj al la movadvivo ĝenerale. Tie troveblis interalie la konstato de d-ro de Zilah, kiu esplorinte pri esperantlingvaj verkoj pri sociaj sciencoj kaj filozofio montris kvazaŭ absolutan neekziston de tia literaturo escepte de kelkcentoj da spiritismaĵoj, malmultvaloraj politikaĵoj kaj nur dek du filozofiaj tradukoj! Spite al tiom senkuraĝiga realaĵo tute alie konkludis la talenta prezento de d-rino Boulton pri "Cent jaroj de Esperanto-prozo" aŭ tiu de Herbert Mayer, kiu raportante pri "Sciencaj Esperanto-institucioj, kulturaj centroj kaj bibliotekoj", substrekis ilian nepran ĉeeston en la estonteco.

Sur la Esperanto-placo en Graz konversacias prof. d-ro Ivo Lapenna (dekstre) kun prof. Paul Neergaard kaj ties filo Jesper Neergaard, skulptinto de la impona monumento "La Espero" en la fono.

Al la kongresa temo krome kontribuis la dumkonferencaj fakaj kunvenoj. La Monda Federacio de Kulturaj Asocioj (MFKA, i.a. eldonanto de *La Gazeto*) okazigis sian trian Forumon; la Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj festis sian tridekjaran jubileon; la tri Akademioj (la Akademio de Esperanto, Akademio Comenius kaj Akademio de la Sciencoj San-Marino) kunvenis kaj komune kaj aparte, kaj tre utilis la klarigoj de d-ro Frank (AIS) pri ties iom komplika funkciado. Fine de la semajno okazis la ĉefkunveno de ICNEM (Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado), kaj ties prezidanto prof. Lapenna anoncis ĝian malfondon, "konsiderante, ke ICNEM kaj *Horizonto* plenumis siajn taskojn: publikigi tiom da materialo pri la Esperanto-movado por la hodiaŭaj honestaj esperantistoj kaj por la studontoj de la movada historio, aranĝi jubilean konferencon kaj starigi memormonumenton." La organo de ICNEM, *Horizonto,* ekde 1988 pluaperos kiel libroteka revuo sesmonata kun enhavo historia, kultura kaj sociscienca; dum la organizadon de la internaciaj konferencoj transprenos MFKA.

Bedaŭrinde mankas spaco por trakti la multajn kulturajn programerojn, per kiuj kompletiĝis JEK. Ke ĝi estos unu el la plej elstaraj eventoj de la jubilea jaro, tion oni jam sciis antaŭ la Graza semajno; sed ke ĝi ebligos kunigon de tiom varia kaj motivita partoprenantaro estis preskaŭ neantaŭcertigebla. Mi jam atendas la venontjaran konferencon kiun organizos MFKA en Metz, Francio en la unua semajno de aŭgusto, kun la temo "Etnaj kaj internacia kulturoj sojle de la dua jarcento".

Pascal Dubourg-Glatigny (Francio)

Afrikaj esperantistoj venis spertiĝi en Hungario

Enkadre de dumonata restado en Centra Eŭropo, grupo de junaj afrikaj esperantistoj — antaŭ ol ekveturi al la jubilea Universala Kongreso en Varsovio — pasigis 4 semajnojn en Hungario. La invitanto estis Hungara Esperanto-Asocio, sed la vojaĝon materie ebligis UEA pere de la Fondaĵo Azio-Afriko. La teamon gvidis s-ro Hans Bakker, unu el la ĉefaj iniciatoroj de la afrika Esperanto-movado, kaj svedino Anita Lindblom.

La hungarlanda restado en Budapeŝto kaj Szeged ne celis amuziĝon kaj distron, malgraŭ tio, ke la afrikaj gastoj (el kiuj la plimulto estis la unuan fojon en Eŭropo) ĝuis ĉion, precipe la imponajn vidindaĵojn de la Danub-borda ĉefurbo. Ili tamen venis ĉefe por partopreni progresigan kurson. La lingvon mem sufiĉe bone posedis ĉiuj. Kompreneble ili perfektigis sian lingvoscion, kaj konatiĝis ankaŭ kun la elementoj de la Esperanta movad- kaj literaturhistorio, sed la ĉefa celo de la kurso, laŭ la peto de UEA, estis alproprigi la diversajn metodojn de la instruado de Esperanto, precipe la t.n. Cseh-metodon, kies naskolando estas ĝuste Hungario.

Tiuj junuloj, pere de la kapablo akirita en Hungario, estos la unuaj Afrik-devenaj instruistoj de Esperanto. Kiel disvastigantoj kaj instruistoj de la lingvo, ili devos stari sur siaj propraj plandoj. Pro tio la unumonata restado vere estis plenŝtopita de instruprogramoj. La modesta studenthejmo en Budapeŝto, kie ili unue loĝis, certigis la eblecon de la tuttaga lingvolernado, kaj la instruistoj — Ferenc Jáki, Eva Farkas, Stefano MacGill, Klára Velösy, Orsika Kiss, Oszkár Princz kaj Sándor Péter — prezentis la diversajn variantojn de la rekta metodo. La antaŭtagmeza programo ĉiutage estis metodologio, kiun posttagmeze sekvis 2-3 studhoroj por perfektigi kaj glatigi la parolkapablon. La junuloj, kiuj lernis la lingvon per korespondado, bezonis tion, ĉar en ilia prononco estis kelkfoje aŭdebla ĝena influo de la franca lingvo.

La tuta taĉmento konsistis el 13 junaj viroj, kiuj venis el 9 landoj. Ili konis nek unu la alian, nek la gepatrajn lingvojn unu de la aliaj, do la ĉefa lingva komunikilo estis Esperanto. Se kalkuli, ke ankaŭ la gvidantoj, instruistoj kaj helpantoj estis diversnaciaj, eĉ diverskontinentaj: Anita Lindblom el Svedio, Hans Bakker el Nederlando, s-ino Wang Lin el Ĉinio, MacGill el Novzelando — la eta mikrokosmo fariĝis bona modelo de la internacia kunlaboro pere de Esperanto.

Jen la nomoj, kiuj eble post kelkaj jaroj estos vaste konataj en Esperantio: Mohamed Bettahar, Brahim Djilali (Alĝerio), Alphonse Diatta (Senegalio), Cameroon Sackey (Ganao), Nzaniye Bernard (Tanzanio), Tchikpe Privas (Benino), Jean-Marie Mboge-Mbele, Thomas S. Wang (Kamerunio), Gbeglo Koffi, Mensah A. Agbemadon (Togolando), Antoine Kouassi Koubalan, Yassi Ambroise (Ebura Bordo), Luc Feidangai (Centrafrika Respubliko)

Péter Sándor (Hungario)

Duobla jubileo en Finnlando

La finnlanda esperantistaro festis samtempe la 100-jariĝon de Esperanto kaj la 80-jariĝon de Esperanto-Asocio de Finnlando, la 12an-13an de septembro en la urbo Tampere. La aranĝon ĉeestis la vicprezidanto de UEA, s-ro Grégoire Maertens, kiu faris ankaŭ la ĉefan paroladon. El la cetera programo elstaris seminario pri la temo "Eblecoj de individuo por internaciaj kontaktoj", en kiu prelegis interalie la eksa vicsekretario de UN, d-rino Helvi Sipilä, kaj d-ro Jouko Lindstedt el la Universitato de Helsinki. La aranĝon partoprenis proksimume 130 homoj, kaj ĝi vekis sufiĉe grandan intereson en la landaj gazetaro kaj radio.

Jukka Laaksonen (Finnlando)

Kulmina norvega kongreso

Apogeon de tre aktiva Jubilea Jaro en Norvegio markis la landa kongreso de Norvega Esperantista Asocio. La kongreson ĉeestis proksimume 60 homoj, inter la 23a kaj 25a de majo en la ĉefurbo Oslo. Interalie oni prezentis la libron *Fenomenet Esperanto,* norvega eldono de la verko de William Auld, kiu rezultis el la traduklaboroj de grupo de norvegaj esperantistoj kaj la eldonagado de Esperanto Forlaget A/S. Du pliaj libroj aperos en la Jubilea Jaro: unu lernolibro kaj unu romano.

En la fina tago de la kongreso okazis Festkunveno en la Universitata Aŭlo en Oslo, kiel digna solenaĵo de la Jubileo. Prologo de Johan Hammond Rosbach kaj salutvortoj de la ĉefparlamentano Jo Benkow inaŭguris la programon, kiu pluiris per muziko norvega kaj pola, fragmento el *Peer Gynt* prezentita de fama norvega aŭtoro, saluto de la norvega Unesko-komisiono kaj festparolado de Claude Piron. Tiun lastan interpretis Otto Prytz por la publiko, kiu alvenis multnombre en la belega somervespero.

Elna Matland (Norvegio)

Sube: la afrika grupo renkontiĝis en Varsovio kun la Estraro de UEA. Kvankam afrika UK prokrastiĝis, planoj progresas por pli malgranda konferenco.

Peto pri referaĵoj

*La **6a Konferenco pri Lingvo kaj Komunikado** okazos la 11-an de decembro 1987 ĉe 777 United Nations Plaza, Novjorko, sub aŭspicio de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo kaj la Traduka Fako de Unuiĝintaj Nacioj. La temo de la konferenco estos: **"Lingvo kaj kulturo en internaciaj organizaĵoj"**. Referaĵojn oni rajtas prezenti en ajna lingvo, sed por tiuj ne en la angla oni devas liveri en la tago de la konferenco ampleksan anglalingvan resumon por disdono al la partoprenantoj. Fakuloj pri la temo kiuj deziras mem partopreni estas petataj sendi siajn proponojn al la organiza komitato p/a **d-ro Humphrey Tonkin, Potsdam College, Potsdam, NY 13676, Usono.***

INSTRUISTOJ

Pliaj pruvoj de revigliĝo

La 21a Internacia Konferenco de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), kiu okazis en Lodzo, Pollando de la 17a ĝis la 24a de julio 1987, allogis 152 partoprenantojn el 15 landoj. Tiuj ciferoj en si mem, inter la plej grandaj el la lasta jardeko, donas kaŭzon por espero pri la "nova epoko" de ILEI, kiun antaŭ unu jaro prognozis ties vicprezidanto Edward Symoens. Nur la tragedia foresto de ILEI-prezidanto István Szerdahelyi, pro la malsano kiu kelkajn semajnojn poste forprenis lian vivon, malhelpis la glatan kaj viglan disvolviĝon de la programo.

Fakan prelegaron ĉirkaŭ la kadrotemo "Esperanto el pedagogia, didaktika kaj lingvopolitika vidpunktoj" provizis Stefan MacGill (Hungario), Till Dahlenburg (Germana DR), Liang Ziming (Ĉinio), Marin Bacev (Bulgario) kaj Irena Szanser (Pollando). Same en la kadro de la konferenco okazis kursoj de Internacia Esperanto-Instituto, gvidataj de Audrey Childs-Mee, kaj Internacia Lerneja Semajno, sub la direktado de Marin Bacev. En tiu lasta programero partoprenis 19 infanoj el kvin landoj, lernante pri diversaj fakoj — de amuza matematiko ĝis la Esperanta literaturo — pere de aro da instruistoj.

En la organiza-administra parto de la konferenco, iusence pli grava por ILEI, lanĉiĝis kelkaj gravaj projektoj: i.a. ellaboro, reviziado kaj sistemigo de ekzamensistemoj kaj pri lingvokono (baza, meza, supera) kaj pri diversaj fakoj (instruado, tradukado, ĉiĉeronado, komercko-respondado); kaj larĝskala enketo inter la legantoj de Internacia Pedagogia Revuo, cele al ĝia plibonigo kaj plitaŭgigo. Kunlabore kun UEA, ILEI pretigas novan Laborplanon kaj planas ĝian eldonon en kajero kune kun dokumentoj pri unueca ekzamensistemo kaj instruprogramo por instruistoj.

Estas jam certe, ke ILEI sentos akran mankon de sia prezidanto en la venontaj monatoj kaj jaroj; sed la 21a Konferenco donis klarajn pruvojn, ke ĝi kapablas tamen daŭre plivigliĝi kaj progresi en sia laboro.

[surbaze de informoj de **Marin Bacev** (Bulgario)]

Mirige varia programo

La 20a Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) estis ĉie tra Zagrebo atentokapte anoncita. PIF do jubileis, kaj — se tuj diri mian ĉefan impreson — mi vere estis mirigita (foje ravita), ke **tiom** da diversaj aferoj estas fareblaj kun aŭ per aŭ en pupoj. El la 10 prezentoj por la Esperanta publiko (PIF ja ĉiam havas paralele alihorajn/alitagajn prezentojn por la ĝenerala Zagreba publiko) mi ĉeestis ok, kaj mi kredas, ke mi kapablas juĝi pli-malpli apreze pri la tuto.

Unu pupteatraĵo, kiun ludis tuta aro da Hungaraj geknaboj, estis sufiĉe klasika: teatraĵo, en kiu rolas pupoj, movataj sur la manoj de la ludantaro. La enhavo estis ĉarma historio pri forpelo de malnobla reĝo — kaj la infanoj nepre ĝin surscenigis tre lerte! La ceteraj prezentoj estis faritaj de plenkreskuloj. Tial mi iom miras, ke ŝajne la ĵurioj simple kunmetis ĉion kune por la prijuĝado: miaopinie oni ja ne povas samkategorie juĝi laboron de infanoj kaj tiun de adoltoj.

Alia problemo rilate la prijuĝadon estas, miaopinie, ke pluraj prezentoj estis faritaj de homo(j), kvazaŭ surscenigantа(j) teatraĵon pli malpli "normalan", dum kiu oni foje utiligis pupeto(j)n por substreki certan eron. Tiajn prezentojn, kiel ajn lertajn kaj atentokaptajn, mi neniam nomus "pupteatraĵo". Ĉe tio unualoke mi pensas pri la grandiozaj lerteco kaj akrobataĵoj de *Timema lupo* (Teatro "Duŝko Radoviĉ" el Beograd), sed ankaŭ, kvankam ĉe sia prezento André Morel (Francio) iom pli sisteme uzadis pupetojn, la spektaĵo *Kandido* ne estis, kion mi kuraĝus nomi "**pup**teatro". Miatakse ĝi estis bonega bildigo, tuŝebligo, surscenejigo de la fama rakonto de Voltaire — kaj tute prave ĝi gajnis unu el la premioj — sed ĝi kongruus eĉ pli bone inter la programeroj de la unuaj tagoj de l'Festivalo — ĉe la teatra programo.

La prezentado kiu pleje min frapis **pupteatre** estis tiu de Robert Banky kaj Giongyi Blasek el Budapeŝto: tiuj geaktoroj uzis pupojn en plej diversaj formatoj — unufoje la aktorino eĉ "sidis" kaŝite en dancanta pupo-paro; alifoje ŝi rolis patrinon kiu sen multa rezulto klopodas por kvietigi siajn batalemajn (pupo)infanojn; krome en ilia ludado ĵonglado larĝe rolis kaj ŝercemo.

Ankaŭ la *Rusa Salo* de la grupo "Skomoroh" el Tomsk (Sovetunio) estis impresa, treege lerta — ankaŭ dance! — kaj gaja. Ilia fabelrakonto nin gvidis tra pluraj landoj, eĉ kun iom da fremdlingvoj ĝustaloke kaj -doze.

Mirigis min la prezento de *Faust* fare de pupteatro "Pupilla" el Wells (Aŭstrio) — kaj tio pro du kialoj: unue, ĉar la uzataj pupetoj estis tiel miniaturaj — kaj samtempe tiel plej fakece faritaj kaj manipulataj — kaj due, ĉar la tutan historion pri Faŭsto oni prezentis plene en la germana. Kaj tio dum la Esperanta parto de PIF! Tamen, persone mi estis tre entuziasma pri ĉi tiu Faŭsto, kaj mi des pli bone komprenas, kial Goethe junaĝe jam estis ravita de tiu rakonto. (Oni ja montris la plej malnovan formon de l'spektaĵo).

Pri la du Italaj grupoj mi prefere diru nenion.

"100 JAROJ DE ESPE

en Zagreb (2-

"Pro la fakto ke al la Zagreba manifestaĵo '100 jaroj de Esp pluraj programeroj kaj lokoj de okazigo devis esti nuligitaj frazo el la "averto" en la ĉijara Festkajero, kiun ĉiu partopre tinde la Esperanto-kursoj en Belgio kaj Hungario, evidentiĝ sed nuligon de planitaj okazaĵoj. En Zagrebo, feliĉe, la prog sube; sed la magra partoprenantaro, en ĉi tiu Jubilea Jaro, d nacia kulturo", kiu bezonas unuavice homojn...



Entute estis bone ĉeesti kaj spekti tiun serion da pupteatraĵoj kaj mi esperas, ke PIF ankoraŭ multajn jarojn povos plue ekzisti kaj — se iel eblos — venontjare allogi iom pli da spektantoj...*

Pri la teatra programo mi povas esti pli rapida. Entute estis planitaj kvar teatraj prezentoj. La dua bedaŭrinde ne povis realiĝi. Teatra grupo el Beogrado (Jugoslavio) la unuan vesperon ĉenis la atenton de la plenplena salono per sia *La lasta fadeno*, girlando da baledo, kantado, ludado. Enhave ne estis sciebla, kio okazas — sed kiel teatra okazaĵo ĝi estis vere grandioza, kaj neforgesebla.

La Bulgara Esperanto-Teatro el Sofio regalis nin la du-

*La ĵurio pri lingvo juĝis *Kandido* unualoke, *La timema lupo* dualoke. Por grupa prezento la unua premio estis aljuĝita al la infana grupo el Hungario kaj la sovetia grupo el Tomsk samtempe. Krome la prezento de *Kandido* gajnis ankoraŭ premion pri "Esperanto kun la publiko" — sed por mi restis enigma kion tio signifas.

La internacia infana ĵurio elektis la grupon el Tomsk. Premio pri "homa mesaĝo" estis ne aljuĝita.

RANTO-KULTURO"

9 aŭg. 1987)

peranto-kulturo' aliĝis multe malpli da personoj ol ni planis, aŭ parte sanĝitaj, ĉefe pro ekonomiaj kialoj" — jen la ĉefa enanto ricevis en Zagrebo. En pluraj ĉi-someraj aranĝoj, nos simila manko de ĉeestantoj, kio foje kaŭzis ne nur sanĝon ramo efektiviĝis kaj montriĝis bonega — pro kio du raportoj devus estigi kelkajn zorgojn pri la sano kaj viglo de nia "inter-



an vesperon per *Pikniko sur la batalkampo* de Fernando Arabal. Absurdisma verketo, kiu montras la idiotecon de militado: ĉiuj geaktoroj, kiel ni kutimas jam de jaroj de ĉi tiu grupo, estis vivece trafaj: seriozaj se tio necesis, burleskaj kie bezonate, ridigaj, stultaj, kortuŝaj.

La lasta prezento estis de Leningrada Esperanto-Teatro. Unue kun ĉentono el *Hamleto* de Shakespeare en la traduko de Zamenhof. En si mem sufiĉe lerte kaj fakece farita — sed mi kredas, ke tiaj ĉentonoj el fame konataj verkoj antaŭsupozas tute alispecan publikon ol nian esperantistan: la nepra plimulto de la ĉeestantoj neniam legis *Hamleto*-n kaj — sekve — ne plene povis sekvi la disvolviĝon de la scenoj. Poste unu viro sola surscenigis la mirindan *La sonĝo de ridinda homo* de Dostojevski. Profunda, filozofiema, foje akre mokanta foje pia, — unuvorte: mirinda kaj emociiga. Por mi ĝi estis plej digna krono sur la dutaga teatra programo. Oni nur povas esperi, ke tiun ĉi teskton niaj Sovetiaj samideanoj baldaŭ broŝure eldonos.

Gerrit Berveling (Nederlando)

Kvieta sed interesa simpozio

Unu el la programeroj en Zagrebo estis dediĉita al la scienca flanko de la verda kulturo, nome al simpozio pritraktanta la temon "Lingvaj problemoj en internacia komunikado". Referis en ĝi dek homoj el dek landoj: Aŭstralio, Aŭstrio, Jugoslavio, Hungario, Japanio, Ĉinio, FR Germanio, Nederlando, Svislando, Italio... kio en si mem estas indiko pri la Esperanto-kulturo, tutcerte; sekvis kaj prikomentis la referaĵojn proksimume kvindeko da internaciuloj, naskante interesajn kaj abundajn diskutojn.

Sinitiro Kawamura, kemiisto el Japanio, parolis pri la temo "Lingvaj problemoj el vidpunkto de japana natursciencisto", emfazante sian sperton uzi Esperanton en sia fako kaj ties avantaĝojn. Li Shijun el Pekino parolis pri lingvaj problemoj en internacia komunikado de Ĉinio kaj pri la instruado de fremdlingvoj en Ĉinio: en tiu kadro li reliefigis la marĝenecon de Esperanto kompare kun la angla kaj ties populareco. Claude Piron, parolante pri lingva komunikado en internaciaj organizaĵoj, akcentis ke ĝi tamen kontentige funkcias — kvankam li ankaŭ atentigis pri ĝiaj mankoj kompare al la komunikado per internacia lingvo: la kostoj kaj ofta senutilo de la tradukoj kaj nefakeco de la laboro (ĉar tradukisto ne povas kompetenti pri ĉio, ja!). Tiu ĉi kontribuo estas aparte valora, ĉar ĝi venis de homo kiu mem servis kiel "tradukinstrumento" kaj objektive taksis kaj avantaĝojn kaj malavantaĝojn de la aktuale praktikataj sistemoj en internaciaj organizaĵoj. Nur en tia lumo ankaŭ la rolo de planlingvo povas esti reale konsiderata.

Klaus Schubert kaj Bart Papegaaij el la konata firmao BSO vere detale prezentis la progreson de la laboroj en la tradukprojekto DLT. Pri tio oni raportis en *Esperanto* antaŭ nelonge kaj ni ne detaligu ĉi tie. Balazs Wacha el Budapeŝto parolis iom eksterteme sed tamen ege interese pri "Esperanto kiel hereda fenomeno", nome pri la lingvaĵo de denaskaj parolantoj de Esperanto kaj pri la dulingvisma situacio en kiu ĉiuj denaskuloj troviĝas.

Ralph Harry bedaŭrinde ne sukcesis mem alvojaĝi sed oni tamen diskutis pri lia interesa referaĵo "La diplomatoj kaj Esperanto". Nikola Rašić parolis pri la valoro de toleremo en E-kulturo, Giuseppe Formizzi pri la rolo de eduko en internaciaj rilatoj kaj Hans Michael Maitzen pri la rilatoj inter la esperantistoj kaj UN.

Konklude, oni diru ke la simpozio estis nenio eksterordinara. Ĝi nek brilis nek grizis. Samkiel la tuta manifestaĵo "100 jaroj de E-kulturo" ĝi pasis labore kaj digne, sed iom kviete. Tamen ĝi altiris konsiderindan atenton de la amaskomunikiloj en Zagrebo kaj ĝiaj reeĥoj — ni kredas — ion signifas.

Nikola Rašić (Jugoslavio)

En la fotoj: maldekstre, vigle prezentiĝis la Ŝtata Pupteatro de Budapeŝto; dekstre, André Morel imponis per Kandido *— sed ĉu temas pri pupteatro?*

Rekorda IJK: precipe distr-okazo?

Ĉi-jare Krakovo, laŭdire le plej bela urbo de Pollando, iĝis la "Mekko" de la junaj esperantistoj: Pli ol 1100 gejunuloj el almenaŭ 44 landoj alvenis al la 43-a Internacia Junularo Kongreso (IJK) de TEJO la 17-an de julio, por partopreni en la plej granda junulara renkontiĝo en la tuta historio de Esperanto. Dum unu semajno ili interkonatiĝis, enamiĝis, festis, ludis, sportumis kaj diskutis pri la kongresa temo "Homo kaj civilizaciaj minacoj".

Unua ebleco por konatiĝi estis la atendado en la vicoj de la akceptejo, kie laboregis stabo de pli ol 70 aktivuloj de Pola Studenta Esperanto-Komitato. Jam tie montriĝis, ke inter la kongresaj kunhelpantoj estas eĉ pluraj engaĝitaj junaj ne-esperantistoj, kiuj subtenas la ideon de Esperanto per dono de sia laborforto dum la kongresa semajno.

Dum la unua vespero, el la granda sporta halo aŭdiĝis surdige laŭta muziko. Tie okazis la "malinterkona" vespero. La malsurdiĝemuloj renkontiĝis ekstere sur la ŝtuparo, kie dum la tuta semajno preskaŭ ĉiam sidis pigraj kaj babilemaj esperantistoj. Tie oni dancis, kantis, ludis kaj eĉ dormis, kvankam por ĉi-lasta afero ekzistis belaj ĉambroj kun molaj litoj — sed iom for por posttagmanĝa dormeto: Parto de la kongresanoj povis promeni al siaj gastigaj studentaj domoj, la aliaj devis veturi per specialaj kongresaj busoj, ĉar iliaj ĉambroj troviĝis je ĉ. 10-kilometra distanco. Tio iom malhelpis al la ekesto de vesperaj postprogramaj kunrestadoj, ĉar la lasta aŭtobuso forbalais la diboĉemulojn al la lito.

Male al la magra nokta programo, la taga programo estis abunda.* La diskutoj komenciĝis ĉe la demando, ĉu la kongresa temo (vidu supre) aludas al "minacoj far la civilizacio" aŭ al "minacoj al la civilizacio". La unuan teorion subtenis la ekskurso al la nazia koncentrejo Auschwitz/Oswiecim — malgraŭ ĉies peno bedaŭrinde ne eblis tute eviti, ke la aro de kelkcent ekskursantaj gejunuloj (ĉirkaŭ triono de la kongresanoj) kreis strangan kontraŭon al la akuzaj monumentoj de homa krueleco. La duan teorion pravigas ekzemple la diskutrondo pri AIDS (Akirita Imun-Difekta Sindromo). Minacojn far kaj al la civilizacio traktis la laborgrupoj pri medidetruo kaj pri la danĝero de atommilito.

Unuafoje en la IJK-historio partoprenis TEJO-aktivuloj el Benino, Centrafrika Respubliko, Eburio, Kamerunio, Tanzanio kaj Togolando. Dum la junaj irananoj bedaŭrinde ne sukcesis vojaĝi al Krakovo, inter ni tamen estis la ĉefmotoro de la pakistana junulara Esperanto-movado. En sia prelego pri la temo "Esperanto en la tria mondo" li kulpigis nun ĉiujn pri la mizero en la malriĉaj landoj, se ni ne faras ion kontraŭ tio, kaj li kritikis la senzorgemon kaj nuran amuziĝemon, per kio ofte Esperanta etoso estas karakterizita. Alia el la plej fascinaj aspektoj de la kongreso estis la kontaktoj inter junaj esperantistoj el okcidentaj landoj unuflanke kaj GDR kaj Sovetunio aliflanke. Bedaŭrindas, ke ni okcidentanoj verŝajne revidos ilin nur post kvin jaroj aŭ pli...

La vesperoj estis plenaj je koncertoj, teatraĵoj, distraĵoj. Rokgrupoj kiel Amplifiki aŭ Persone facile sukcesis plenigi la grandan kongresejan halon, kiu estis sporteja salonego, sed por teatraĵoj la halo ne donis la ĝustan etoson kaj akustikon. Eĉ la plej efikaj laŭtparoliloj ne povas plibonigi tion. Per troa laŭteco ne eblas kapti la atenton de la publiko. Laŭdindas en tiu kunteksto la pantomima teatraĵo "Maratono" de grupo de surdmutuloj el Varsovio. "Iafoje unu gesto aŭ movo enhavas pli da vero ol multaj vortoj" ili skribis, kaj tio bonege videblis.

Dum la komitatkunsidoj okazis ardaj diskutoj pri la estonteco de TEJO. Elektiĝis kvin-kapa nova estraro, kies ĉefaj taskoj estas ordigi la konfuziĝintajn financojn kaj trovi pliajn junajn kunlaborantojn por reatingi la nivelon de la TEJO-agado de la antaŭaj jaroj.

Kerstin Schulze, Edlyn Teske kaj Thomas Pusch (FRG)

* *Pri tio mi tamen aŭdis malsamajn opiniojn!* **Red.**



Amaso da flagoj faris imponan bonvenon; pakistana aktivulo Saeed Ahmed Farani instigis al konscio pri la Tria Mondo.

TEJO-AFEROJ

Nova estraro: *(en la fronta vico supre, kun Patronoj)*

Jan Koszmaluk (prezidanto), ul. Chlopickiego 49 C/2, PL-04-275 Warzawa, Pollando *(tria de dekstre)*
Dietrich Weidmann (ĝenerala sekretario), Ungarbühlstr. 27, CH-8200 Schaffhausen, Svislando *(tria de maldekstre)*
Claude Rouget (kasisto), Breivika stud. bol. 614, N-9000 Tromsø, Norvegio *(ĉefine, dekstre)*
Sándor Hideg (estrarano), Fonal Ut., H-1184 Budapest, Hungario
Rezsö Baross (estrarano), Balzac u. 11. H-1136 Budapest, Hungario
Silvia Pilger (komisiito pri kongresoj), Leekerhoek 26, NL-8223 Lelystad, Nederlando *(ĉefine, maldekstre)*
Dimitar Dimitrov (komisiito pri scienca aplikado), kv. Mladost 1A - bl. 501 - vh. 4 - ap. 113 - et. 8, Sofia, Bulgario *(dua de maldekstre)*
Gabor Deak Jahn (komisiito pri eksteraj rilatoj), adreso ĉi-momente nekonata

TT fariĝis abonebla

La oficiala organo de TEJO, *TEJO tutmonde,* estas nun abonebla kontraŭ 15 gld. jare (ses numeroj), pere de la Centra Oficejo. TT nemalhaveblas por ĉiu, kiu interesiĝas pri la aferoj de TEJO. La redakcia adreso: Andy Künzli, Zumhofstr. 22, CH-6010 Kriens LU, Svisl.

Fariĝu patrono de TEJO!

TEJO estas en kriza financa stato. Por ĝia resanigo necesas enspezoj — kaj por ili necesas kaj membroj kaj mecenatoj. Vi povus helpi per donacado de membriĝoj al viaj gefiloj, al junaj amikoj kaj parencoj. Aŭ fariĝu Patrono de TEJO kontraŭ trioblo de la MJ-kotizo (vd. p.187). Tiel vi ankaŭ kontribuos al la estonteco de UEA, ĉar sana TEJO nun ja signifos sanan UEA-n iam poste! Agu nun — pagante pere de la Centra Oficejo en Roterdamo. Kaj instigu aliajn en via landa movado fari same. Koran dankon!

KSA-informcentro

TEJO-komisiono pri scienca kaj faka agado (KSA) celas kompili liston de prelegantoj kaj de sciencverkoj kreitaj de junaj esperantistoj (t.e. de TEJO-aĝo, malpli ol 26-jara). Ĝenerale KSA serĉas junajn kunlaborantojn en la diversaj sciencaj fakoj. Instigu viajn junajn konatojn sin anonci ĉe Dimitar Dimitrov (adreso supre).

Komuniko pri aliĝpeto de Katalunio

Okaze de sia kunsido en Krakovo la komitato de TEJO unuanime kun unu sindeteno akceptis la aliĝpeton de Kataluna Esperanto-Junularo kiel landa sekcio de TEJO

Tiu decido tamen kontraŭas artikolon 2.8(2)(iii) de la regularo de TEJO, laŭ kiu landa sekcio de TEJO estu aŭ aparta asocio aŭ integra parto de landa asocio aliĝinta al UEA. Kataluna Esperanto-Junularo estas integra parto de Kataluna Esperanto-Asocio, kiu ne estas membro de UEA, kaj pro tio la komitata decido forfalas pro malvalido. KEJ plenumos la minimumajn kondiĉojn pri aliĝo se ĝi fariĝos sendependa asocio, aŭ se KEA mem fariĝos membro de UEA.

KULTURO

Recenzo pri kvar renkontiĝoj

Post tritaga trajnvojaĝo de Madrido al Budapeŝto kaj ioma ĉi-tiea restado mi alvenis al Segedo (Szeged, suda Hungario), kie inter la 10a kaj la 16a de julio okazis Internacia Jubilea Semajno aŭ io similnoma. Proksimume 120 gejunuloj (ne tro granda, sed ja optimuma nombro) renkontiĝis en ia kampadeja lernejo ĉe la rivero Tiso (Tisza) apud la landlimo kun Rumanio kaj Jugoslavio.

Relative trea internacieco de la partoprenintoj kreis allogan konatiĝan etoson, al kio kontribuis varia distra kaj ekskursa programo. Ĉefe la afrika grupo igis la renkontiĝon alia, pli vigla kaj unika: ekz. iliaj aliritmaj Esperanto-kantoj rapide populariĝis forŝovante de sur muzikemaj lipoj la — pro ripetado — jam tedajn verdstelajn tradiciajojn. Krome, organizantoj organizis ĉion glate, nerimarkote senprobleme.

Kaj, jen, preskaŭ ĉiuj el ni fortrajniĝis al Budapeŝto, kie nin atendis eble plia cento da hungaraj, jugoslaviaj k.a. gejunuloj por kune trajni al Krakovo por la Internacia Junulara Kongreso. Segedanoj (pli ĝuste estus: segedintoj) okupis unu kaj duonan vagonojn, daŭrigante la antaŭan renkontiĝon, kiu, iele iome, memstare vivis plu sub la amasoj kaj tumultoj de la sekvaj du kongresoj.

Krakovo: de la 17a ĝis la 24a. Inter 900 kaj 1000 partoprenantoj. La unuan tagon ĉiuj sentas sin en homĝangalo. Multaj el tiuj spertintaj antaŭajn ijokojn asertas, ke la nivelo de ĉi tiu malpli altas. Tio certe rimarkeblis en la tema programo, kiu maldisvolviĝis sukcese. Ankaŭ libroservo, vera libroservo, mankis. Sed plaĉis al mi konatiĝoj, ekskursoj, promenoj tra la malnova Krakovo, proksima naĝejo, luksega vegetara restoracio, eksterprogramaj eroj kaj nova homa surprizo: pli-ol-kvardekpersona sovetia grupo. Grave plenigis la programon muzikaj aranĝoj (Amplifiki kaj Persone, reludontaj varsovie) kaj teatraĵo ludata de surdula trupo: "Apokalipso", vere impona.

Krome, rilate TEJOn, konstateblis, ke kongresanonombro pli ol duoblas nombron de TEJO-membroj (ĉirkaŭ 400), kiu, cetere, pro malkresko, pli kaj pli proksimiĝas al la nombro de TEJO-komitatanoj. Ĉi tiuj iel aktivis ekster la kongreso aŭ, pli ĝuste, la kongreso vivadis ekster ties kunsidoj kaj decidoj.

Kaj de la 25a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto, en Varsovio, la Universala Kongreso, kun preskaŭ 6000 verdsteluloj. Pri ĝi vi povis jam multon legi. Gejunuloj disformikis kuniĝonte vespere por la muzik- kaj danc-ado. Problemo de la IJK akriĝis en Varsovio: kiam oni drivas inter tiom da homoj, oni emas malekkoni aliujn kaj kontaktas nur jamajn amikojn.

Fine, de la 1-a ĝis la 8a, 50 aŭ 60 gejunuloj kunvenis en Okbero (mallongigo por: **Ok**cidenta **Ber**lino). Ni loĝis en gimnazio en Krucmonta kvartalo, proksime al la muro, kiu disigis nin de Orlino (mallongigo por **Ori**ento Ber**lino**). Preskaŭ absolute mankis programo, krom en la (pri)inisma tago; tial ĉefa okupo dum tiu semajno estis promeni tra Okbero, viziti ĝiajn muzeojn, parkojn, monumentojn, parlamentejon, olimpikan stadionon, la muron kaj, kompreneble, okberajn bierejojn kaj turkajn manĝejojn. La 7an ni ekskursis al Orlino, kie nin atendis pluraj orlinaj junaj esperantistoj akompanontaj nin tra la urbo: muzeoj, pliaj promenoj en bela vetero, kaj komuna vespera aranĝo kun glutaĵoj kaj babilado.

Resume, bonan enkondukon por jubilea somerumado prezentis modesta fotalbuminda renkontiĝo en Segedo. Ĝin sekvis la IJK, kiu tamen postlasis malpli impone dolĉan guston, ol antaŭvideble. Inundo sekvis — lavanga UK. Tio, alio, jen, multe, tre, tro da verdo. Kaj ripoziga nenifarado en Okbero. Kaj al Hispanio re.

Georgo Kamaĉo (Hispanio)

IJK evidente plaĉis al Kawai Mio (Japanio)...

Kalendaro

Ne forgesu daŭre sendi kalendarajn informojn!
Limdato por la marta Kalendaro: **15a de februaro 1988.**

Daŭre: Konstanta Internacia Esperanto-Lernejo en Bydgoszcz, Pollando (BET "Esperantotur", str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)

Oktobro

19-24: **Esperanto-staĝo,** Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)

23-26: **Internacia Seminario** "Civilizaciaj minacoj", Toruń, Pollando (Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj, RU ZSP, ul. Moniuszki 16/20, PL-97-100 Toruń)

24-25: **Studa semajnfino,** Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)

26-31: **1-a Kristana Kultur-Semajno Esperantista,** Kultura Centro Esperantista, Svislando (KCE, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)

28-30: **Internacia Scienca Simpozio** "Esperanto 100-jara", Universitato de Vieno, Aŭstrio (Aŭstria Laborkomitato "Esperanto 100-jara", Pf. 92, A-1183 Wien)

30-01: **FLEJA Semajnfino,** Waasmunster, Belgio (Patrick Haerick, M. Verdoncklaan 77, B-9219 Gent)

Novembro

06-08: **Trilanda Renkontiĝo,** Senta, Jugoslavio (Esperanto-societo Senta, Senta, Vojvodino)

07-08: **Aŭtuna Staĝo** de Kultura Esperanto-Federacio de Orienta Francio, Montigny-les-Metz, Francio (Marthe Nau, 6 allée Marguerite, F-57158 Montigny-les-Metz)

19-22: **9a Konferenco pri Internacia Lingva Komunikado,** Lódź, Pollando (Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj, Uniwersytet Lódzki, ul. Narutowicza 41, PL-90-125 Lódź)

23-28: **Esperanto-staĝo,** Kultura Centro Esperantista, La Chaux de-Fonds, Svislando (KCE, Pf.771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)

27-30: **Internacia Film-foto-video-festivalo,** Pula, Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, Pf. 499, YU-41000 Zagreb)

28-29: **Studa semajnfino,** Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)

28-30: **Novembra Junulara Festivalo,** Montaro Ozren apud Tuzla, Jugoslavio (NJF, Esperanto-Junularo, R. Vokića 2, Dom mladich, YU-75000 Tuzla)

Decembro

04-06: **30a Kultura Semajnfino,** Kardinal-Wendel-Haus, Homburg/Saar, FR Germanio (Sarlanda Esperanto-Ligo, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt)

06-08: **Esperantista Renkontiĝo** okaze de la studenta festo, Internacia Esperanto-Kursejo, Smoljan, Bulgario (IEK, Pk. 791, BL-1090 Sofia)

21-26 **Esperanto-staĝo,** Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)

26-03 **Vintro-Feriado,** Kultura Centro Esperantista, Svislando (KCE, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)

27-02: **4a Internacia Festivalo,** Kassel, FR Germanio (Hans-Dieter Platz, Maikammerer Str. 21, D-6731 St. Martin; temo "Minoritato kaj kulturo")

27-03: **30a Internacia Seminario de GEJ,** Hannover, FR Germanio (Germana Esperanto-Junularo, Eifelstr. 9, Bonn 1; temo "Sano")

27-03: **Vintra Esperanto-Feriado kun Lingvo-Instruado,** Krynica, Pollando (Pola Studenta Esperanto-Komitato de Asocio de Polaj Studentoj, ul. Ordynacka 9, PL-00-950 Warszawa)

27-03: **Internaciaj Vintroferioj** en Domo Montana, Gsies, Italio (Eki Woite, An der Kirche 33, D-6115 Münster/ Darmstadt, FR Germanio)

28-29: **2a Internacia Ekonomikista Simpozio,** Budapeŝto, Hungario (Expressz-Vojaĝagentejo, Esperanto-Sekcio, Pf. 567, H-1395 Budapest)

28-02: **17a Vintra Esperantista Ferio,** Budapeŝto, Hungario (Budapeŝta Komitato de HEA, Pf.153, H-1443 Budapest)

29-02: **Novjara Esperantista Ferio,** Internacia Esperanto-Kursejo, Smoljan, Bulgario (IEK, Pk. 791, BL-1090 Sofia)

Reagoj

La redakcio bonvenigas viajn reagojn al temoj lanĉitaj en niaj paĝoj. Bv. skribi koncize kaj klare, prefere kun spacoj inter la linioj. Ni rezervas la rajton mallongigi leterojn por aperigo. Spaco malpermesas, ke ni publikigu ĉiujn — sed ĉiuj estas nepre bonvenaj!

Paŝeto al vera neŭtraleco

Reagoj en *Esperanto*! Kia surprizo! Dankon kaj gratulon pro la nova direkto, kiun mi jam ekperceptas en la paĝoj de la UEA-organo. Laŭ mi, la vera neŭtraleco ne konsistas el senopinieco, sed male el multopinieco.

Prentiss Riddle (Usono)

Pri la Jubilea Numero

Jen spegulo de nia movado: unueco tra diverseco!

Edmond Ludwig (Francio)

Plej plaĉis al mi la artikolo de Thomas Bormann. Espereble li kaj aliaj junuloj metos la informadon pri Esperanto sur pragmatan bazon. Idealismon oni ne injektas en alian homon, ĝin probable akiros por si mem la varbitoj, post ol fari intiman kontakton kun la lingvo kaj ĝiaj potencialoj.

L.H. Knoedt (Brazilo)

Mi gratulas sincere pro la nekutime riĉa enhavo. Ankaŭ la ŝpareme kolora preso bone aspektas. Nur unu makuleto: la poemoj je paĝoj 125 kaj 140 tro malbone legeblas pro la fonaj sed tro trudemaj fotoj sampaĝaj.

Gerrit Berveling (Nederlando)

Mi penege estas kopiinta la malhelajn partojn de la poemoj, kaj nun poste mi povas ĝui la du poemojn tute. Ambaŭ tamen devus esti presitaj tute en klare legebla maniero sen konfuza fono.

Gustav Stenholm (Svedio)

Red.: *Ĉe la koncernaj paĝoj fakte temas parte pri malsano, kiu atakis la tutan numeron: ĉiuj bildoj estas tro malhelaj. Krome la bildaj fonoj por la poemoj estis iom ambiciaj. Mi mem malspertas pri foto- kaj pres-tekniko, kaj ĉi-foje nia fotisto misjuĝis pro nova procezo. Ni klopodos eviti ripeton estonte!*

Neŭtraleco aŭ justeco?

Nek mi nek mia edzino povas elpensi iun validan kaŭzon por la diferencoj inter la kongreskotizoj por aliĝantoj el nia lando kaj listo de nacioj kiuj plejparte estas en, de aŭ influata de "la Okcidento" kaj tiuj el landoj de alia listo. Kial oni atendu ke mi pagu 2-3-oble la kotizon kiun pagus sami deano el — ekzemple — Orienta Germanio, Ĉeĥoslovakio, Barejno aŭ Irano? Mi konkludas, ke UEA ne plu estas neŭtrala organizaĵo.

J.A. Cox (Britio)

Red.: *La kaŭzo kompreneble estas la relativaj ekonomiaj fortoj de la diversaj landoj de la mondo. Postuli unumonatan salajron de la loĝantoj de iu lando kaj nur unutagan salajron de la loĝantoj de alia ŝajnas netolereble maljuste: UEA celas almenaŭ parte egaligi la alireblecon de la Universalaj Kongresoj, ene de siaj limigitaj ebloj.*

Pliefikigi niajn kongresajn kunvenojn

La Varsovia kongreso estis la kongreso de rekordoj. Ĉu·ankaŭ la nombro de la kunsidoj ne estis rekorda? Tamen ŝajnas al mi ke la unikaj eblecoj de la UK povus esti pli profunde eluzataj. Por mi plej kontentigaj estis la "informaj kunvenoj" (ekz. Esperanto-Centro Paderborn), kie la suksceso dependas de la vervo de la preleganto. Pli ofte, tamen, mi spertis serion de monologoj (ekz. la Verduloj). La prezidanto donas klarigojn; sekvas pluraj prelegetoj pri aliaj iniciatoj. Tamen la tuto donas senkoheran impreson. La kunveno ne apelacias al la publiko por kunlabori. Kontraŭe, mi foriris kun sento pri diseco de agado.

Plej malkontentigaj estis la "kritikaj kunvenoj" (ekz. Ĝenerala Kunsido de UEA). La gvidantoj invitas por diri kritikojn sed mobilizas siajn intelektajn kapablojn por pruvi la malpravecon de la kritiko. En tia etoso, homa kontakto ne eblas.

Ĉu ne ekzistas aliaj metodoj pli fruktodonaj? Mi imagas kunvenon kie la gvidanto komencas per esplordemandado pri la problemoj kaj sugestoj de la ĉeestantoj. Poste sekvu kelkminuta interrompo por ekzameni, ĉu evidentiĝas ripetiĝo de sama problemo aŭ sugesto, eventuale tuj traktebla. Tiam restas ankoraŭ 30 minutoj por priparoli unu temon, serĉi pliajn ĉi-rilatojn ideojn, sondi pri kunlaborpreteco kaj eventuale jam ellabori planon (kio povus ankaŭ okazi poste).

Tio estas unu ideo, sed certe ne la nura por efika tempouzo. Ĉu ne indus organizi unutagan seminarion pri efikaj kunventeknikoj en la unua tago de la UK en Roterdamo?

Ivo Durwael (Belgio)

Por lingvo taŭga por ĉiuj

Mi ne konsentas kun la reago de s-ro Lapenna (*Esperanto* 1987/p.32). Kiel evoluus Esperanto se ankaŭ la neeŭropanoj enkondukus tiom da fremdaj vortoj kiel la eŭropanoj faris? Ekzemple (PIV) samsencvortoj por praloĝanto: indiĝeno, aŭtoktono, aborigeno! Se Esperanto fine malvenkus.... estus ĉar kelkaj ne volas serĉi solvon taŭgan por ĉiu: logikan, facilan, precizan komunikilon.

Hélene Falk (Belgio)

Oni povas diri ke ĝuste la neokcidentkulturaj geesperantistoj stimulas nin reveni al la Esperanto de la unua epoko (almenaŭ je iuj vidpunktoj), precipe al tiu de la profetaj avertoj jen de Zamenhof jen de aliaj eminentaj esperantistoj, kontraŭ la elitigo kaj samtempe la dialektigo de Esperanto. Ekzemple Th. Cart: "Jen kial ni timas kaj kontraŭbatalas ne la **naturan** progreson kaj evoluadon, sed ĉian artan — vere teorian kaj kontraŭnaturan — rapidan ununacian pliriĉigon kaj restas senŝanceliĝe fidelaj al nia modesta, eĉ malriĉa, sed por **ĉiuj** homoj, por **ĉiuj** klasoj, por **ĉiuj** popoloj kiel eble plej facilakirebla internacia Fundamenta lingvo." (Feb. 1913; el *Vortoj de profesoro Th. Cart,* Jaslo 1927, p.30.)

Ilio Calabresi (Italio)

Laste aperis...

Amuleto, La, Conrad Ferdinand Meyer (1825-1898). El la germana trad. Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1987. 48p. 21cm. Jubilea Eldon-serio 2. Beletro tradukita 14. ISSN 0179-1044. Novelo el la melankolia periodo de la granda svisa verkisto. Prezo: 15,00 gld.

Amuza legado pri Til' Strigospegul', Hermano Boto (ĉ. 1467-ĉ. 1520). El la germana trad. Rikardo Ŝulco. Paderborn: Esperanto-Centro Paderborn, 1987. 376p. 21cm. Ilus. ISBN 3-922570-47-X. La plej malnova versio de la legendo pri trukema vagabondo; kun antaŭ- kaj postparoloj kaj notoj de la tradukinto. Prezo: 45,00 gld.

Antologio de fantastikaj rakontoj de sovetaj verkistoj, vol. 1. Ĥarkovo: Ukraina Respublika Filio de ASE, 1986. 56p. 18cm. Enhavas ses tradukitajn rakontojn plus enkondukan eseon. Prezo: 4,50 gld.

Antologio de fantastikaj rakontoj de sovetaj verkistoj, vol. 2. Ĥarkovo: Ukraina Respublika Filio de ASE, 1986. 56p. 18cm. Tri tradukitaj rakontoj. Prezo: 4,50 gld.

Artificial Language Movement, The (broŝurita), Andrew Large. Oxford: Basil Blackwell, 1987. 239p. 23cm. ISBN 0-631-15487-6 (broŝ. eld.). Pli aĉetebla eldono de jam klasika verko el 1985. Prezo: 42,00 gld.

Astura bukedo, div. aŭtoroj. El la hispana trad. F. de Diego, J. Camacho, L. Dek. Gijón: Astura Esperanto-Asocio, 1987. 138p. 18cm. Ilus. ISBN 84-398-8908-9. Poemoj kaj rakontoj de kvin asturiaj verkistoj, transantaj pli ol jarcenton. Prezo: 18,00 gld.

Atomoj por paco, Aŭstralia Departemento pri Eksterlandaj Aferoj (1985). El la angla trad. Ralph Harry. Kanbero, 1985. 14p. 21cm. Mimeo. Parolado de ministro Bill Hayden. Prezo: 3,00 gld.

Aŭstria Ŝtatprezidento Franz Jonas kiel esperantisto, Ernst Rixner. Vieno: Aŭstria Esperanto-Instituto, 1987 (neindikita). 8p. 21cm. Prezo: 1,80 gld.

Baza Cseh-kurso. Hago: Internacia Esperanto-Instituto, 1987. 170p. 23cm. Gvidilo por instruantoj, sepa eldono reviziita. Prezo: 24,00 gld. *Vd. ankaŭ sub "Diversaĵoj".*

Biblio, La, div. aŭtoroj, red. Philippe Cousson. Poitiers Cedex: Evangeliaj Kajeroj, 1987. 84p. 21cm. Mimeo. La unua numero en planata serio, kiu kunmetos artikolojn el diversaj vidpunktoj ĉirkaŭ kristanisma temo. Prezo: 10,20 gld.

Dek fabeloj. Lernolibro por grupa legado aŭ hejma studado, Charlotte Kohrs kaj Dorothy Kruger. Sandiego: La Tigro, 1986. 36p. 28cm. Ilus. de Alan Henderson. ISBN 0-939057-09-3. Bele prezentita, kun glosoj por anglalingvanoj. Prezo: 10,50 gld.

Dianto de sur la poeta tombo, La, August Šenoa (1838-1881). El la kroata trad. Božidar Vančik. Varaždin: Esperanto-societo Varaždin, 1987. 40p. 20cm. Romaneto pri ekkono de la propra nacia kulturo. Prezo: 6,60 gld.

Enkonduke por la VIa Kongreso, Truong-Chinh. El la vjetnama trad. Dang Dinh Dam k.a. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo, 1986. 46p. 19cm. Paroladoj de la ĝenerala sekretario de la Vjetnama Komunista Partio. Prezo: 1,20 gld.

Esperanto-ĉina vortaro, ĉefred. Honfan (Ĝang Honfan). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1987. 1036p. 19cm. Bind. Unudirekta vortaro enhavanta 18300 kapvortojn, abundajn detaligojn kaj utilajn prilingvajn kaj priĉiniajn tabelojn ĉe la fino. Unu el la plej kompletaj Esperanta-nacilingvaj vortaroj. Prezo: 60,00 gld.

Esperanto básico (Baza Esperanto), Evaldo Pauli. Florianópolis (Brazilo): Eldonejo Simpozio, 1985. 222p. 21cm. Komplete dulingva lernolibro por portugallingvanoj, nepre nur por tiuj kun antaŭa sperto pri lingvoj. Prezo: 15,00 gld.

Esperantsko-český česko-esperantský slovníček. 64p. 16cm. Sen bibliografiaj indikoj. Prezo: 6,00 gld.

F.V. Dorno's Paraphernalia, F.V. Dorno. Antwerpen: Vlaamse Esperantobond, 1982. 226p. 29cm. Diversspecaj verketoj, plejparte aŭtobiografiaj, en la nederlanda, angla kaj Esperanto. Prezo: 22,50 gld.

Fabeloj, aŭtoro neindikita, el la angla trad. Miroslav Malovec. Třebíč: Esperanto-klubo Třebíč, 1986. 31p. 21cm. Ilus. de Mirka Tomečková. Mallongaj infanrakontoj kaj -poemoj. Prezo: 6,00 gld.

Fluas la rivero Jodo, Syûho Utuki. Takatuki: Takatuki-Esperanto-Societo, 1986. 106p. 21cm. Mallongaj rakontoj el la kulturo, kaj tradicia kaj moderna, de vilaĝoj ĉirkaŭ japana rivero. Prezo: 13,80 gld.

Ni daŭrigu, Jaan Ojalo. Kaunas, 1986. 65p. 19cm. Mimeo. Broŝ. Postelementa kurslibro por lernejaj instruistoj. Prezo: 6,90 gld.

Diversaĵoj

Baza Cseh-kurso, instruanta kompleto. Hago: Internacia Esperanto-Instituto, 1987. Diversaj instruiloj por kompletigi la libron *Baza Cseh-kurso.* Prezo: 15,00 gld.

Kasedo: La evoluo de Esperanto kaj la Akademio, W. Bormann. Messkirch: Bernard Eichkorn. Prelego el Konstanz, 1984-09-03. Prezo: 10,20 gld.

Kasedo: La nomkarto, verkis kaj kantas La Mevo (Hirojuki Sakei kaj Takao Ono). Jokohamo: La Mevo, 1987. Esperantaj rokenrolaj kantoj. Prezo: 17,10 gld.

Kasedoteksto: Tute ne gravas, Amplifiki. Ĝenevo: Bendofako de LF-Koop, 1986. 8p. 21cm. Ilus. Prezo: 3,30 gld.

Sondisko kaj **kasedo: Passport,** Joëlle Rabu. Vankuvero: Goldrush Records, 1987. Kantoj en la angla, la franca kaj Esperanto de la populara artisto. Prezo: (ambaŭ formoj) 31,20 gld.

Wörterkartei. Messkirch: Armin Gmeiner, 1987 (neindikita). Kartaro kun unuflanke la mil plej oftaj Esperantaj vortoj, aliflanke la germana traduko. Prezo: 24,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezaj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 20% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Loke

● **Bangladeŝo:** Ekde la 12a de majo 1987, validas leĝo en ĉi tiu iama brita kolonio kiu postulas uzon de la bengala kaj malpermesas la anglan. Tiu parlamenta decido celas firmigi politikan kaj kulturan sendependecon por la cent milionoj da bangladeŝanoj.

● **Norvegio:** Pere de la Esperanta versio, 64-paĝa gvidlibro al la muzeo de la Norvegaj Fervojoj (Hamar) nun ricevis tradukon en la hispana, kataluna, itala, serbokroata, franca, nederlanda, pola, finna, greka, ĉeĥa kaj hungara. Tiujn oni disponigas al vizitantoj en la formo de fotokopiitaj kajeroj — haveblaj kontraŭ po NOK 10,00 de Pf. 248, N-2301 Hamar. En la foto: kuratoro Per Johan Krogstie apud enireja ekspozicio.

● **Dominikana Respubliko:** La 25an de julio Héctor Martínez kaj Eugeniu Mustea intervjuiĝis ĉe la landa televido dum 25 minutoj. Sekve la Universitato Aŭtonoma de Santo-Domingo aŭspicias 20-lecionan kurson por dudeko da lernantoj. Jamaj finlernintoj Martínez kaj Robert Suero intencas starigi klubon: leterojn, materialojn sendu al Martínez, Secretario General, Universidad Autónoma de Santo Domingo, Santo Domingo.

● **Ebura Bordo:** Post reveno de la afrikana grupo el la UK kaj Zagrebo, okazis la unua enafrika internacia renkontiĝo en Bingerville, la antaŭ ĉefurbo de Ebura Bordo. Oni invitis 25 delegitojn el 13 afrikaj landoj.

● **Portugalio:** La 12an de aprilo inaŭguriĝis momumento honore al Zamenhof en la urbo Barreiro. Skulptis ĝin Pedro Peres da Silva.

Oficiala Informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ
F.T.H. Stein, Nederlando; Martin Parlan, Usono; Dario Besseghini, Italio; E. Semaska, Britio.

DUMVIVA PATRONO DE TEJO
Italio: Ranieri Clerici.

PATRONOJ DE TEJO 1987
Britio: Tom C. Fraser. Nederlando: Dini Kappert. Norvegio: Margrete Landmark. Svedio: Lennart Aberg. Ĝis nun: 54.

SOCIETO ZAMENHOF 1987
Aŭstralio: Margaret Mary Chaldecott. Britio: E.A. Fairbairn. Finnlando: Terttu Tyynelä. Francio: André Gilles; Jean Gibaux; Roger Despiney. Japanio: Saburô Yamazoe. Kanado: W.D.B. Hackett. Meksikio: Julie L. Regal. Nederlando: A.M.E. van Walsem-Schutte; Ru H. Bossong. Norvegio: Margrete Landmark; Olav Reiersøl. Svedio: Erik Lundvall; Gunnar Olsson; Jim Hornø; Sven Sundin; Szilard Szabad; Vasilka Börjesson. Usono: Prof. Eugene H. Thompson Jr.; Milton O. Brown. Ĝis nun: 192.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA
PATRONOJ (minimume $100): Finnlando: Tapio Sormunen. Usono: Prof. Eugene H. Thompson Jr. SUBTENANTOJ (minimume $25): Japanio: Prof. Saburô Yamazoe. AMIKOJ (minimume $10): Usono: Charles G. Marr; Duncan Charters.

DONACOJ 1987 (gld.)
ĝis la 31-a de aŭgusto

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Aŭstralio: V. Payne 100,45. Belgio: L. Dreze 200,00; R. Delhaye 25,00. Britio: F. Curtis 165,57. Finnlando: H. Kesälä 134,15. Nederlando: A.J. Middelkoop 500,00; Y. Weidema 50,00; J.T. Koopmans-Schotanus 100,00. Svedio: J. Hammarberg 20,00. Sumo ĉi-jara 8389,04.

FONDAĴO CANUTO: Belgio: L. Dreze 45,25. Finnlando: H. Kesälä 100,00; T. Grundström 16,10. Nederlando: Frisa Esperantista Rondo 57,50. Svedio: L. Mánsson 80,00. Sumo ĉi-jara 3104,46.

FONDAĴO ANTONI GRABOWSKI (en usonaj dolaroj): FR. Germanio: Esperanto-Blindenverband 200,-. Sumo ĉi-jara 450,53.

ĜENERALA KASO: Belgio: A. Tsirimokos 358,75; L. Dreze 75,00. Kanado: Betty Salt 1534,34; Dorothy Hawley 154,50. Nederlando: Fam. Bossong 22,51. Svislando: Fam. Cool 100,00. Usono: C.W. Tustin 50,77; P.M. Shanks 74,00; Ges-roj Helmuth 327,60. Voĉoj Kristanaj 69,84. Diversaj malgrandaj 18,45. Sumo ĉi-jara 8494,66.

ASOCIA KAPITALO: Heredaĵo Gretchen Doris 197,78. Heredaĵo W. Veldman 5000,00. Sumo ĉi-jara 5197,78.

JUBILEA JARO: Aŭstralio: S. Burkitt 210,00. Britio: Ges-roj Gardner 59,23. Japanio: T. Yamada 70,04. Kanado: Betty Salt 1534,33. Nederlando: A.M.E. v. Walsem-Schutte 80,00. Usono: W.A. Shanks 74,15. Sumo ĉi-jara 6906,62.

PROPAGANDA KONTO: Div. malgrandaj 9,10. Sumo ĉi-jara 184,10.

FONDAĴO SCIENCO KAJ TEKNIKO: Belgio: R. Delhaye 25,00. Japanio: K. Watanabe 100,45. Sumo ĉi-jara 1849,25.

FONDAĴO TEJO: Usono: W.A. Shanks 74,00. Anonima donaco 5,00. Sumo ĉi-jara 2181,79.

FONDAĴO WUSTER: Anonime: 2250,70. Nederlando: W.A. Verloren van Themaat 20,00. Sumo ĉi-jara 7279,33.

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Kanado: A. Laur 152,17. Nederlando: Y. Weidema 50,00. Usono: P.M. Shanks 74,15. Sumo ĉi-jara 3531,88.
Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

● **Meksikio:** D-ro Pedro Magana Erosa intervjuiĝis 20-minute ĉe la loka televidstacio en Ĉiŭaŭa, teme pri la centjariĝo de Esperanto.

● **Sovetunio:** Inter la plej disvastiĝintaj artikoloj pri Esperanto estas kelkaj el anglalingvaj gazetoj. La ĵurnalo de la anglaj komunistoj, *Morning Star,* aperigis ampleksan artikolon la 3an de marto kiu poste trafis en Sovetion; kaj la ĉiusemajna sovetia gazeto *Za rubeĵom* (Eksterlande) publikigis ruslingve la artikolojn el *Der Zeit* (FRG) kaj *U.S. News and World Report* (Usono).

● **Brazilo:** La nova ĉefdelegito, d-ro Jorge das Neves, efektivigis imitindan projekton en junio: en la urboj Volta Redonda kaj Brazilio li gvidis kunvenojn de delegitoj el la ĉirkaŭa regiono, por interŝanĝi spertojn, problemojn kaj ideojn.

● **Britio:** Eric Walker, kunlabore kun kvakera vojaĝagentejo kiu celas plifaciligi homajn kontaktojn inter Britio kaj Sovetio, aranĝas parte esperantistan karavanon al Leningrado kaj Moskvo, emfazante la utilon de Esperanto por senpera komunikado. Detaloj ĉe li, Nacton, Ipswich IP10 0JZ.

● **Francio:** Dissendiĝis la 16an de majo tuthora elsendo dediĉita al Esperanto flanke de France-Inter. Intervjuisto Roland Dhordain kontaktis UFE kaj plurajn esperantistojn, inkluzive eksterlandanojn loĝantajn en Parizo. La 21an de junio, la televidprogramo "Bonjour la France" donis sian filatelan elsendon al la jubileaj poŝtmarkoj.

Esperantistoj el 8 landoj ĉeestis la ĉi-jaran Internacian Semajnon ĉe Mediteraneo, inter la 13a kaj 20a de septembro. Tiun aranĝon jam dekfoje organizis Esperanto-grupo de Montpellier

Fake

● **Grafikarto:** En Brno, Ĉeĥoslovakio,ĉiun paran jaron okazas vasta internacia ekspozicio pri grafika arto. En 1986 partoprenis 591 artistoj el 52 landoj. Estos loko en 1988 ankaŭ por Esperantaj afiŝoj k.s.: skribu ĝis la fino de oktobro 1987 al Bienale Brno, Husova 14, CS-662 26 Brno.

● **Sano:** La samarkandaj esperantistoj organizas internacian ekspozicion pri sana vivmaniero. Sendu ajnlingvajn materialojn al la adreso sub "Paco", kiel eble plej baldaŭ.

● **Lingvo kaj Religio:** La 15an-16an de junio efektiviĝis la delonge planita konferenco ĉi-tema de CED (Centro Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo). Partoprenis kvardeko da lingvistoj, teologoj, pastroj kaj UN-funkciuloj. CED antaŭvidas eldonon de la aktoj de la konferenco.

● **Monumentoj:** Dum la 82a Skota Esperanto-Kongreso en majo inaŭguriĝis la unua "Esperanto-vojo" en Skotlando. Ĝi troviĝas apud la internacia flughaveno Prestwick, proksime de Glasgovo.

● **Naturamikoj:** Elstare bela numero de *La Migranto,* la revuo de TANEF, aperis en junio honore al la Jubileo. Amaso da altkvalitaj koloraj fotoj igas ĝin aparte taŭga por ekspozicioj. Ekz-oj haveblas de Erna Döring, Pf. 225, CH-4003 Basel, Svislando, kontraŭ po 3 irk-oj.

● **Paco:** Laŭ iniciato de lokaj esperantistoj fondiĝis en Samarkando, Sovetunio, Muzeo de Paco kaj Solidareco. En la urbocentra muzeo troviĝas afiŝoj, fotoj, insignoj, libroj, revuoj ktp de diversaj sociaj movadoj el pli ol 40 landoj. Materialojn sendu p/a Internacia Amika Klubo "Esperanto", Pk. 76, SU-703000 Samarkand.

Jésus Raposo Montero, aŭtoro (sub la nomo "Adorador Universal") de *El poema de la Creación y el Destino* kaj *Manifiesto por la Paz!,* serĉas eldonanton/distribuanton por la Esperanta versio: Bachiller 2, 4a, E-46010 Valencia, Hispanio.

● **Verkistoj:** De la 10a ĝis la 17a de majo kunvenis en Lugano (Svislando) la 50a Kongreso de PEN Internacia, la monda organizaĵo de verkistoj. Esperanto enprogramiĝis, la unuan fojon post la fondo de PEN en 1921, per "Seminario de Esperantlingvaj Verkistoj" kaj per 10-minuta parolado de Tibor Sekelj en la pleno. Esperantlingva Verkisto Asocio planas aliĝpeton por la venontjara kongreso en Seulo, Koreujo, post ĉi-jara malakceptiĝo.

Same la unuan fojon rolis Esperanto en la "Poeziaj Vesperoj de Struga", makedona festivalo kiun partoprenis 300 poetoj el 42 landoj. Denove aktivis Tibor Sekelj, kiu inaŭguris la eventon per sia traduko de poemo de makedono Konstantin Miladinov; sekve oni invitis EVA-n ĉiujare ĉeesti.



● **Filatelo:** Amaseto da jubileaj poŝtaĵoj aperis en junio kaj julio (vd. dorskovrilan anoncon). Krom poŝtmarkoj el Malto, Germana DR kaj Ĉinio, aperis koverto en Sovetunio kaj pluraj unuatagaj kovertoj en Ĉinio: ne malpli ol 15, kun 28 poŝtstampoj el 25 diversaj urboj. La foto montras la koverton el Changzhou, desegnitan de veterana esperantisto Zhang Linrui (Ĉanŝio) — ankaŭ konata kiel redaktoro de *Verda Lampiro.*

● **FR Germanio:** Debutromano *Der Klang der Fanfare,* el la plumo de Johano Strasser, furoretas germanlingve. Temas pri vivhistorio de esperantisto, tiel ke multloke eĉ aperas Esperantaj frazoj kaj aludoj al ĝia kulturo. La libro haveblas de UEA kontraŭ 55,20 gld. plus sendokostoj.

● **Germana DR:** Unika apliko de Esperanto troviĝas en la Metiejaj Kulturtagoj de Halle, kiu sukcese disvolviĝis la duan fojon dum la lasta semajno de februaro. Partoprenis ĉ. 90 junaj esperantistoj el kvin landoj, por praktike pliperfektiĝi en diversaj artkampoj: plastika arto, danco, muziko, literaturo, fotoarto. Plia kresko de la aranĝo atendeblas en 1988; intertempe ĝi jam ricevis konsiderindan atenton en landaj amaskomunikiloj.

En la sama urbo eldoniĝas *Novaĵoj el Halle,* dumonata informilo por neesperantistoj kiu bonvenigas ĉiuspecajn pri-Esperantajn informojn. Skribu al Kulturbund der DDR, Bezirkvorstand Esperanto, PSF 161, DDR-4010 Halle.

Persone

Appleby: Wilfred M. Appleby, konata brita filatelisto, lastatempe retiriĝis pro aĝo el sia posteno kiel delegito en Cheltenham. Ĉi-jare li kaj lia edzino Kay festas sian 70-jariĝon kiel esperantistoj kaj geedzoj.

Brownlee: La honora sekretario de Esperanto-Asocio de Britujo, John Brownlee, malgraŭ malforta fizika stato ankoraŭ gvidas 34 perpoŝtajn lernantojn en la Tria Mondo kaj daŭre respondas al informpetoj ĉe EAB. Sian kernan (akordeonan) rolon en Londona E-Ĥoro li same feliĉe (kaj obstine) sukcesas teni.

Haszpra: De la 1-a de julio 1987 prof. d-ro Ottó Haszpra, membro de la nuna estraro de UEA, direktas la Instituton pri Akvoinĝenierarto de la Budapeŝta Teknika Universitato. La Instituto estas unu el la plej malnovaj en Hungario, estante rekta posteulo de tiu fondita en 1782 en Pest. Prof. Haszpra samtempe estras ĝian anglalingvan fakon — supozeble nur ĝis fondiĝos Esperanta!

KOTIZTABELO POR 1988

Lando/valuto	MG	MJ(-K)	MA(-K)	SA	Kto	SZ
Argentino/*guldeno*	6,50	16	40	24	12	80
Aŭstralio/dolaro	8	20	50	30	15	100
Aŭstrio/ŝilingo	67	168	420	252	126	840
Belgio/franko	200	500	1250	750	375	2500
Brazilo/*guldeno*	6,50	16	40	24	12	80
Britio/pundo	3,20	8	20	12	6	40
Bulgario/*guldeno*	7,50	18,80	47	28,20	14,10	94
Ĉeĥoslovakio/krono	40	100	250	150	75	500
Danlando/krono	38	96	240	144	72	480
Finnlando/marko	24	60	150	90	45	300
Francio/franko	32	80	200	120	60	400
FR Germanio/marko	10,50	26	65	39	19,50	130
Germana DR/*guldeno*	10	24	60	36	18	120
Greklando/draĥmo	480	1200	3000	1800	900	6000
Hinda Unio/rupio	32	80	200	120	60	400
Hispanio/peseto	480	1200	3000	1800	900	6000
Hungario/forinto	160	400	1000	600	300	2000
Irlando/pundo	2,90	7,20	18	10,80	5,40	36
Islando/krono	192	480	1200	720	360	2400
Israelo/*guldeno*	9	22,80	57	34,20	17,10	114
Italio/liro	6500	16000	40000	24000	12000	80000
Japanio/eno	880	2200	5500	3300	1650	11000
Jugoslavio/dinaro	2560	6400	16000	9600	4800	32000
Kanado/dolaro	6,50	16	40	24	17,10	80
Korea Resp./*guldeno*	9	22,80	57	34,20	17,10	114
Nederlando/guldeno	12	28	70	44,50*	22,30*	140
Norvegio/krono	35,20	88	220	132	66	440
Nov-Zelando/dolaro	9,60	24	60	36	18	120
Pollando/*guldeno*	6,50	16	40	24	12	80
Portugalio/eskudo	480	1200	3000	1800	900	6000
Soveta Unio/*guldeno*	8,50	21,20	53	31,80	15,90	106
Sud-Afriko/*guldeno*	10,50	26	65	39	19,50	130
Svedio/krono	35,20	88	220	132	66	440
Svislando/franko	10	24	60	36	18	120
Usono/dolaro	5,60	14	35	21	10,50	70
TARIFO A/guldeno	7	18	45	27	13,50	90
TARIFO B/guldeno	6,50	16	40	24	12	80

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio.
TARIFO A: Honkongo, Kuvajto, Malto, Singapuro.
TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Por ĉiu validas la nuna loĝlando. Ĉiuj kotizoj supre menciitaj validas por la kalendara jaro.

*inkluzivas la enlandan imposton de 6%.

MG: Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado
MJ(-K): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 25 jaroj, revuo *Kontakto* sen plia abonpago)
MA(-K): Individua Membro-Abonanto kiel MJ(-K) plus la revuo *Esperanto*
SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto,* sen membreco en UEA
Kto: Abono al la revuo *Kontakto,* sen membreco en UEA/TEJO
SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (**ne** inkluzivas membrecon en UEA)
PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-K) por subteni TEJO (**ne** inkluzivas membrecon); ricevas *Kontakto*-n k.a. eldonaĵojn de TEJO.
DM: Dumviva membro de UEA pagas por la tuta vivo en unu fojo 25-oblon de la kotizo MA. Oni ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto,* kaj se kaj dum oni ankoraŭ estas malpli ol 26-jara, la revuon *Kontakto.*

Anoncetoj

Tarifo: Ĉiu vorto kostas unu guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la aperigo de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj bv. vidi la kolofonon.

Enlumiĝo, nova poemaro de Goodheir, GBP 2,80 (inkl. sendk.) de Kardo, 16 Woodlands Drive, Coatbridge, Skotlando.

FEF (Hinda Unio) petas bondezirajn bildkartojn kaj ekspoziciaĵojn por la tutlanda kongreso kaj centjara jubileo okazontaj je la 12a-13a de decembro. Adreso: Aŝok Sengupta, 26/D Radha Madhab Dutta Garden Lane, Calcutta 700 010, Hindio.

Skribu el ĉiuj partoj de la terglobo! Deziras amikiĝi tutmonde, ankaŭ interŝanĝi poŝtmarkojn f-ino Laurence Reibel, 5 rue Ste-Barbe, F-68120 Richwiller, Francio.

Materialojn por ekspozicio en marto 1988 petas aktiva E-klubo de Univ. Kuk-ĝe. **Dez. kor.** 15 gestudentoj. Nia klubo semis E-on en 4 novaj urboj, ĉisomere okazigas 25an senpagan kurson por urbanoj de Seulo. Gvidprofesoro: So Gilsu, Sodemun Pk. 59, Seulo, Koreio.

"Survoje al pontokulturo": Materialoj pri la kosmopolita humanismo (homaranismo). Enhavo: *Homaranismo hodiaŭ, Marburga Manifesto, Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj* (Unuiĝintaj Nacioj), *Deklaracio pri homaranismo* (Zamenhof), *Preĝo sub la verda standardo* (Zamenhof). Jen la minimumo, kiun ĉiu esperantisto devus scii pri la hodiaŭa homaranismo! Vi ricevos la verkon kontraŭ 4 int. respondkuponoj, de: Homarana Asocio, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

De la ĵus-mortinta prof. Szerdahelyi mi havas kelkajn korespondaĵojn. Kontraŭ sendo de tri irk-oj sendos fotokopiojn d-ro W.A. Verloren van Themaat, Volkerakstraat 38-I, NL-1078 XT Amsterdam, Nederlando.

Studento Wesley Arnold deziras korespondi. 3972 Dallas, Warren, Michigan 48091 Usono.

Tradukoj en E-o por antologio de porinfanaj poemoj, kun nacilingvaj originaloj kaj biografiaj indikoj pri la aŭtoroj, serĉataj precipe el la plej disvastigitaj aziaj kaj afrikaj lingvoj: O. Knichal, Dési Huber u. 13/iii, Budapest 9, Hungario.

Esperanto-grupo de Keitele intencas aranĝi ekspozicion kaj pro ĝi ni petas esperantaĵojn el la tuta mondo, precipe de infanoj kaj de gejunuloj: leteroj, bildkartoj, insignoj, pentraĵoj, fotoj ktp, eĉ pupoj. Dankrespondoj garantiitaj! S-ro Veikko Tabell, SF-72600 Keitele, PL 10, Finnlando.

John Dickinson anoncas, ke li ne plu estas membro de la bahaa kredo. Personoj, kiuj volas pli da informoj, skribu al li ĉe 4 Casaba Terrace, Llanfoist, Abergavenny, Gwent NP7 9NR, Britio.

Nekrologoj

FORTUNÉ CADENEL (1901-1987), membro de UEA kaj unu el la organizantoj de la Universala Kongreso en Marsejlo (1957), mortis en tiu urbo la 18an de junio.

RAYMOND FIQUET (1904-1987), delonga aktivulo kaj iama prezidanto de la Esperanto-Klubo de Nico, forpasis la 3an de junio. Li iniciatis kaj eldonis *La nica literatura revuo* (1955-1962), kiu sub la redakto de Gaston Waringhien fariĝis unu el la plej gravaj kulturaj revuoj en Esperanto.

HORST FISCHER (1931-1987) mortis la 26an de junio en Rastatt, FR Germanio, kie li estis delegito kaj aktiva movada organizanto ĝis sia malsaniĝo.

FRATO HENRY JOSEF CMI (1891-1987) mortis frue ĉi-jare en Kozhikode, Hindio, kie li estis delegito kaj fakdelegito pri medicino.

JO HOEKSTRA-SIEDERS (1921-1987), dumviva membro de UEA, forpasis aŭguste en Groet, Nederlando.

GRACE KIRKWOOD, fakdelegito pri ornitologio en Coffs Harbour, Aŭstralio, mortis la 18an de aprilo 1987. En 1977 aperis ŝia traduko de *Trezorinsulo* de R.L. Stevenson, kiu en tri jaroj atingis duan eldonon.

F-ino B.F. KLIPHUIS, dumviva membro de UEA kaj delegito por Sappemeer, Nederlando (1955-1978), mortis la 2an de septembro en Hoogeveen.

PETAR LEVAR (1907-1987) mortis la 24an de junio en Kalinovec, Jugoslavio. 57 jarojn li estis esperantisto, i.a. fakdelegito pri mondfederismo, landa reprezentanto de TEVA kaj Cseh-metoda instruisto kiu gvidis plurajn bazlernejajn kursojn.

D-RO WALTER MUTSCHLER, dumviva membro de UEA, mortis en marto 1987 en Freudenstadt, FR Germanio.

STEN ÖFORS (1922-1987) mortis la 31an de januaro en Stokholmo. Profesia presisto, li disponigis sian sperton al la Movado: i.a. ĉiuj eldonaĵoj de la stokholma UK (1980) estis kompostitaj de li. Dum longa tempo li redaktis *Esperanto-Nytt,* informilon por neesperantistoj.

FOLKE PETTERSSON (1918-1986), fakdelegito pri fervojoj de pli ol 25 jaroj, mortis en junio 1986 en Solna, Svedio.

D-RO WILHELM TREUDE, dumviva membro de UEA kaj malavara subtenanto de ĝia laboro — speciale ĉe UN — mortis la 12an de julio en Stuttgart, FR Germanio.

WIJTZE VELDMAN (1894-1987), delegito en Wolvega (Nederlando) de 1960, mortis la 26an de junio, lasinte al UEA dankindan testamentaĵon.

NEKROLOGOJ pri interalie István Szerdahelyi, Peter Schilperoord kaj Cyril John Adcock aperos en la novembra numero.

ŜIRKALENDARO '88

- unu paĝo por ĉiu semajno
- festotagoj en pli ol 100 landoj kaj aliaj historiaj datoj
- kaj en unika abundo:

* historioj

* enigmoj

* aforismoj

* bildrakontoj



* receptoj

* desegnoj

* spritaĵoj

* kaj aliaj...

Kunverkis anoj de Nederlanda Esperanto-Junularo. Mendu de la Libroservo de UEA (7,50 gld. plus sendokostoj; sesona rabato por minimume 3 ekz.)

---

la amiko, kiu helpas instruistojn transformi komencantojn en parolantojn

Juna amiko

4 numeroj jare, 8,40 gld ĉe UEA au nacivalute ĉe multaj perantoj. Petu specimenon de HEA, pf 193, H-1368 Budapest, Hungario

La amiko, kiu paroligas

Desegnaĵoj: Pavel Rak

---

el la seminario organizita de UEA ĉe Unesko (1985):

PLURILINGUISME ET COMMUNICATION

red. F. Lo Jacomo

Studadon de komunikado oni ne limigu al studado de teknologiaj iloj por diskonigi informojn: jen la ĉeftemo de la 24 aŭtoroj de ĉi tiu verko. kies tekstoj prilumas unuflanke la riĉan kontribuon de lingva diverseco al la homa heredaĵo, aliflanke la gravecon kaj aktualecon de la tiufontaj komunikaj problemoj. 80% franclingva, 20% anglalingva.

Plurlinguisme et communication, red. F. Lo Jacomo. Paris: SELAF, 1986. 330p. 24cm. ISBN 2 85297 194 1. Prezo: 57,00 gld.

La Plej Moderna Lernolibro Por La Parolantoj De La Franca

- pedagogia metodo konceptita de du lingvo-profesoroj
- 12 lecionoj kun legaĵoj, gramatiko, vortaro, ekzercoj kaj ŝlosilo por memlernantoj
- metriko kaj poezio
- beletraj, sciencaj kaj teknikaj literaturaĵoj
- praktikaj informoj pri la apliko de Esperanto, ĝiaj Movado, literaturo kaj gazetaro
- adresaro de Esperanto-asocioj en la ĉefaj franclingvaj landoj.



Pli ol 130 paĝoj **Prezo: 43 FF, 270 BF, 11 SF, 9 Can.$**

APROBITA DE UNUIĜO FRANCA POR ESPERANTO KAJ BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

ELDONIS: HEROLDO DE ESPERANTO

STUDOJ PRI LA INTERNACIA LINGVO
Etudes sur la langue internationale
Studies on international Language

Gent
AIMAV
1987

Michel Duc Goninaz (ed.)
Université de Provence à
Aix-en-Provence
En collaboration avec
la Universala Esperanto-Asocio

J. Leyk, La Esperanta socio fronte al la ekstera medio; U. Lins, Marxismus und internationale Sprache; D.L. Gold, N.Z. Maimon's La kaŝita vivo de Zamenhof; ***R.E. Wood,*** *The Development of Standard Phonology in Esperanto;* ***P. Janton,*** *Latentaj strukturaj trajtoj de la Esperanta gramatiko;* ***R. Rokicki,*** *Leksemstrukturaj aspektoj klasifiki la Esperantan morfemaron;* ***I. Szerdahelyi,*** *Principoj de Esperanta etimologio;* ***M. Duc Goninaz,*** *Problemes sémantiques et sociolinguistiques dans l'usage de l'espéranto;* ***C. Piron,*** *Créativité et expression linguistique.*

Mendu de la Libroservo de UEA: 39,00 gld. plus sendokostoj, 1/3-rabato por minimume 3 ekz.

Fokuso

Kvaronjara popularscienca magazino

64 paĝoj, 22 × 15,5 cm
Jarabono ĉe UEA 24 gld.

SENPAGA PROVEKZEMPLERO:
HEA-FOKUSO, Pf. 193, H-1368
Budapest, Hungario

ESPERO POR SENESPERA MONDO:

Jen tre grava kaj urĝa mesaĝo pri la konfuzita mondo. Skribu por senpaga libreto al: *INTERNACIA BIBLIO-MISIO*, 29 Plantation Road, Poole, BH17 7LN, Britujo.

Bjalistoka Jubilea Medalo
el bronzo * 10,5 cm * 341 gr.

Unuflanke, reliefa portreto de Zamenhof; aliflanke, Jubilea desegnaĵo kaj teksto.

Mendu de la Libroservo de UEA (36,00 gld. plus sendokostoj — minimume 5 gld., alikaze 10%; 1/6-a rabato por tri aŭ pli da ekz.).





Jubileaj Filatelaĵoj

9 landoj emisiis poŝtaĵojn honore al la Centjara Jubileo de Esperanto. Ne malhavu ĉi tiun unikan kolekton! Mendu de la Libroservo de UEA (aldonu 10% por sendokostoj; triona rabato por tri aŭ pli da ekzempleroj de ĉiu unuopa filatelaĵo).

Laŭhorloĝe:		**gld.**
GDR:	poŝtmarka bloko	4,50
Bulgario:	poŝtmarko	3,00
	maksimumkarto	4,50
Surinamo:	poŝtmarkserio	7,80
	,, en plasta ujo	9,90
Ĉinio:	poŝtmarko	3,00
	unuataga koverto	4,50
Pollando:	poŝtmarko	3,00
	unuataga koverto	4,50
Kubo:	poŝtmarko	3,00
	unuataga koverto	4,50
Malto:	poŝtmarko	3,00
	unuataga koverto	4,50
Sovetunio:	koverto	3,00
Koreio:	poŝtkarto	1,80